revuo
# esperanto
februaro 1967
60-a jaro
n-ro 735 (2)
universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



## David McCallum:
## „Ni havu plenan interkomprenon”

# ESPERANTO
## revuo internacia

**Fondita** en 1904 de H. Hodler

**Redaktoro:** D-ro V. Sadler

**Ĉion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

**Ĉiu materialo por difinita numero** devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

**Manuskriptoj** por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa marĝeno.

**Bankisto de U.E.A.:**
Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

**Presisto:** Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

**Traduko kaj represo** de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

**Jara abono (1967):** 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

**Tarifo por reklamoj:** ricevebla laŭ peto.

**Anoncetoj:**
0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

**Legantoj en 83 landoj.**



**Estraro de U.E.A.:**

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

**Serva Centro:** ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.


**enhavo**


**17** En la Internacia Jaro de Turismo

**18** AIDA ? (Albault)

**19** Subskriboj por la Propono al UN; Italaj studentoj kaj la lingva problemo

**20** Ĉu vitro-produktado komenciĝis en Israelo ?

**23** Iom pri la akuzativo (Beaucaire)
Nekrologoj Clark, Nikiforova, Plzenská, Stoičkova

**24** El la Belartaj Konkursoj 1966:
"Balado de kontraŭdiroj" (Villon/Pilger)
"Kial vi min vokis ?" (Aŝvinikumar')

**25** Recenzoj:
La filmo "Incubus"

**27** Ricevitaj eldonaĵoj
Libroj plej vendataj en 1966

**28** Leteroj
52-a Universala Kongreso, Tel Aviv, 1967
19-a Kongreso de IFEF, Fulda, 1967

**29** Mallonge

**30** La Juna Vivo:
23-a IJK de TEJO, Natanja, 1967

**31** Memoriga kalendaro
Esperanto en radio

**32** Oficiala informilo n-ro 398:
Ekzameno en Tel Aviv
Membro-statistiko 1966
Internaciaj konkursoj 1966: rezulto

**34** Datreveno de Zamenhof
Danko pro bondeziroj
Anoncetoj


**kovrila bildo**

Por niaj legantinoj: David McCallum, ĉefrolanto de la televidserio "The Man from UNCLE", spektata en pli ol 60 landoj kaj en preskaŭ tiom da lingvoj. Al la demando "Se vi povus ŝanĝi ion ajn en la mond-situacio, kion vi ŝanĝus ?" li respondis en ĵurnal-intervjuo: "Mi insistus kaj forte proponus, ke oni instruu Esperanton al ĉiu infano en la mondo, por ke en unu generacio ni sukcesu havi plenan interkomprenon".

**bildojn liveris**

**22** Near East Tours, Amsterdam


# oficiala organo de universala esperanto-asocio

**(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)**

**esperanto**
**februaro 1967**

*Nesebr, Bulgarujo*

# EN LA INTERNACIA JARO DE TURISMO

Almenaŭ pri unu afero la antaŭnelonga Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj voĉdonis unuanime: ĝi deklaris la jaron 1967 Internacia Jaro de Turismo. La koncerna rezolucio invitis la Ŝtatojn-Membrojn antaŭenigi la internacian turismon, kun aparta atento al la evoluantaj landoj. La ideo devenis de UIOOT, la Unuiĝo Internacia de Oficialaj Organizaĵoj por Turismo, kies prezidanto, s-ro Arthur Haulot, cetere subskribis la Proponon de UEA al Unuiĝintaj Nacioj.

Jam sen tio la internacia turismo rapidege disvolviĝas: ĝi kvarobliĝis en la lastaj 15 jaroj. Sed la kresko ne estis ĉie egala; en afrikaj landoj ĝi ankoraŭ multe postrestas.

En la senco de la rezolucio de UN, Unesko jam komencis propagandi ĉi-jare la turismon, precipe en ĝiaj kulturaj aspektoj. Tiurilate la elekto de Israelo kiel lando de la ĉi-jara Universala Kongreso estis certe feliĉa. En la muzeoj, historiaj konstruaĵoj kaj arĥeologiaj elfosaĵoj de tiu lando, kie la konfliktoj kaj kunfluoj de diversaj kulturoj dum multaj jarmiloj estas ankoraŭ konstateblaj, troviĝas senfina kultura intereso por ĉiuspecaj turistoj. Artikolo aliloke en tiu ĉi eldono atentigas pri nur unu aspekto de tiu kultura trezoro.

Ankaŭ el lingva vidpunkto — ja de la lingvo dependas unuavice la hodiaŭa kulturo — Israelo devas aparte interesi nin. Same senprecedenca kiel la kreiĝo de vivanta neŭtrala internacia lingvo estis la kuraĝa decido revivigi en Israelo la antikvan hebrean lingvon kiel modernan lingvon ankoraŭ pli junan ol Esperanto.

La kresko de internacia turismo speguliĝas ankaŭ en la kreskanta nombro de internaciaj Esperanto-aranĝoj: kongresoj, seminarioj, renkontiĝoj, festivaloj, kiuj ĉiam havas ankaŭ siajn turismajn aspektojn. Informojn pri la ĉefaj aranĝoj por la venontaj monatoj la legantoj povas trovi en la kalendaro sur p. 31. Por pliaj informoj oni turnu sin al la koncernaj organizaĵoj, lokaj delegitoj k.s. En la lastaj jaroj la suma nombro de partoprenantoj de tiaj Esperanto-aranĝoj estis ĉ. 12 000 jare.

Kion ankoraŭ ni povas kontribui al la Internacia Jaro de Turismo? Jam estas anoncita la apero de nova, kolorilustrita revuo "Esperanto-turismo". Sur loka nivelo oni povas fari specialajn klopodojn ĉi-jare por aperigi novajn turismajn prospektojn en Esperanto. La Internacia Jaro de Turismo eble helpos tiurilate konvinki instancojn, kiuj ĝis nun ne uzis Esperanton. Fine, la monda reto de Delegitoj kaj turismaj Fakdelegitoj de UEA devus montri ĉi-jare konsiderindan kreskon. Ĝuste ĉe turistoj la bezono de internacia lingvo estas granda, kaj sur tiu kampo ankoraŭ multo estas farebla.

A. Albault

**La fruaj jaroj de Esperanto estis periodo de tre rapida disvastiĝo de la lingvo. Ĉu el la tiamaj labormetodoj de Zamenhof ni povas ĉerpi iun rimedon por akceli la nunan disvastiĝon? La estrarano de UEA pri kulturaj aferoj, d-ro Albault, konkludis, ke jes.**

# AIDA ?

Jen io, kio ĉiam mirigos: en 1887 Zamenhof estis sola; 13 jarojn poste, en 1900 jam estis esperantistoj pli-malpli tra la tuta mondo !

Oni venas al la penso, ke, se ni denove aplikus la metodojn de Zamenhof, kaj se nur manpleno da esperantistoj aplikus ilin sisteme, ni povus en deko da jaroj konsiderinde vastigi nian movadon kaj ĉesigi ĝian staton de skeleta magreco.

Ho ! Kompreneble nenio estas simpla kaj facila. La sociaj kaj intelektaj kondiĉoj ege ŝanĝiĝis. Sed aliflanke ankaŭ Esperanto ege ŝanĝiĝis: de simpla projekto iniciatita de unu verkisto, ĝi fariĝis lingvo en konstanta "kreado", laŭ la Zamenhofa terminologio; ĝi fariĝis vivanta lingvo uzata tra la tuta mondo kaj en ĉiuj fakoj de la homa aktiveco ... Bedaŭrinde, nur iom magre.

Kion do faris Zamenhof? Nu, lia unua faro estis verki 40-paĝan broŝuron, la "Unua Libro", kiu entenis, post longa enkonduko, kie li klarigis siajn celojn kaj proponis metodojn por "krei" la lingvon — ni dirus hodiaŭ ke li proponis unuan "bazan laborplanon" — , ses mallongajn tekstojn, la 16-regulan gramatikon kaj vortarfolion kun la 920 plej necesaj radikoj: la "baza radikaro" de la epoko.

Lia dua paŝo estis eldoni kaj eldonigi tiun "Unuan Libron" en diversaj lingvoj: rusa, pola, germana, franca, angla, sveda ... kaj grandakvante dissendi ĝin tra la mondo laŭ la tiutempe haveblaj adresaroj kaj jarlibroj.

Pli poste li eldonis ankoraŭ aliajn broŝurojn diversformatajn, kiuj jam enhavis informojn kaj eldirojn de famuloj pri la kreiĝanta movado.

Ni notu ankaŭ, ke antaŭ la unua mondmilito ekaperis la fama serio de Ĉefeĉ-ŝlosiloj: etaj broŝuroj (12 × 8 cm), ĉirkaŭ 10 gramojn pezaj, kiuj en proksimume 40 paĝoj donis laŭ klaraj artikoloj la esencon de la gramatika strukturo kaj plie sufiĉe ampleksan dulingvan leksikoneton, el kiu estis eliminitaj la vortoj identaj en la du lingvoj. La kovrilo donis favoran deklaron de la Franca Scienca Akademio kun kelkaj mallongaj informoj. Eldonitaj en pli ol 40 aŭ 50 lingvoj, ŝajne tiuj ŝlosiloj nun estas malpli efikaj. Aliflanke tiuj homoj, kiuj provas lerni laŭ ili, erare opinias ĉion scii kaj foriras kun ideo pri tro rudimenta lingvo.

Se ni volus apliki similan metodon hodiaŭ, kiajn konturojn povus havi taŭga broŝuro ? Esence, ĝi devus kroĉi la homojn al la movado, same kiel kapablis la Zamenhofaj broŝuroj siatempe. De la Ĉefeĉaj ŝlosiloj ĝi devus reteni la materian prezenton: malpeza kajereto facile dissendebla, eventuale kun letero, en ordinara koverto ordinare afrankita. Eble iom pli larĝa formato ebligus pli agrablan tipografion kaj allogajn ilustraĵojn.

La enhavo devus inspiriĝi de la modernaj psikologiaj komercaj metodoj. Skeme eblas resumi la koncernan metodon al la kvazaŭnoma mnemonika litergrupo AIDA.

**A: Atenton mi petas!** Per sia ekstera aspekto la broŝuro kaptu la atenton kaj emigu plu scii pri la enhavo. Kilogramoj da papero invadas la labortablojn kaj enfalas la paperkorbojn ĉiumatene: kaptu la okulon unue, due la atenton !

**I: Ideojn mi donas !** Necesas bildigi la temon kaj komprenigi la pravon, la intereson kolektivan kaj individuan, ĝeneralan kaj personan de nia celado. Tio estu la plej abunda parto de la broŝuro: altnivelaj kaj aktualaj informoj pri la lingvo kaj la movado. Ĝi elvoku la ideojn, ke nia lingvo estas vivanta, disvastigita kaj taŭga; ke ĝia scio estas necesa al ĉiu klera homo; ke ĝi estas juna literatura lingvo. Inter la subpartoj devus esti unu pri la lingvo mem prezentata tra kelkaj bone elektitaj proverboj kaj popoldiroj, maksimoj kaj eldiroj de famuloj, k.s. Tiu subparto devus esti per si mem alloga. Modernaj homoj ne plu havas tempon por legi "la kato kuŝas sub la seĝo; la hundo primordas oston". Ili volonte revenos al paĝo de bone elektitaj citaĵoj, eĉ se ili devas divene traduki la lastajn ... La tuto estu elvokiva kaj alloga: ĝi invitu al studado; ĝi neniel pretendu instrui.

**D: Decidon prenu!** Tiu tria parto estas gravega, ĉar se la antaŭa jam montris la pravecon de nia afero, tamen restas, ke la leginto tro emas opinii, ke tio ne koncernas lin persone. Nun necesas demonstri al li, ke ĉar li estas persone koncernita, necesas, ke li mem decidiĝu lerni.

**A: Agu!** La konkludo estos tiel lakona kiel la enkonduko: ĝi proponos al la leginto mendilon, kiun sufiĉos subskribi kaj forsendi kun ĉeko por ricevi la plej bonan, taŭge elektitan metodon por memlernado: statistiko de C.E.D. montris, ke plej multaj esperantistoj estas memlernintoj.

La unuaj eldonoj de tia broŝuro estus eksperimentaj: ni lernus el la eraroj. Ili povus esti eldonitaj de UEA kaj de la koncernaj landaj asocioj. Angla, franca kaj hispana eldonoj devus esti la unuaj. Per ili eblus tuŝi krom la originaj landoj ankaŭ aron da aliaj en Afriko, Ameriko kaj Azio.

Por ke kampo surkreskiĝu, oni prisemu ĝin. Kaj ni konfesu, ke la jam prilaborataj kampoj estas ankoraŭ tro maldense plantitaj ...

# SUBSKRIBOJ POR LA PROPONO AL U.N.

Ĝis la komenco de 1967 subskribis la Proponon, kiun UEA transdonis al Unuiĝintaj Nacioj la 6-an de oktobro, ankoraŭ kelkaj miloj da individuoj kaj pluraj gravaj organizaĵoj. La novaj sumoj estas do: 925 034 individuoj kaj 3846 organizaĵoj kun preskaŭ 73 milionoj da membroj. Pliajn subskribojn ankoraŭ ĉiam akceptas la Centra Oficejo de UEA, kiu ankaŭ senpage dissendas subskrib-foliojn al petantoj. (Vidu decembro, p. 197).

Al la eminentaj individuaj subskribintoj antaŭe menciitaj en "Esperanto" ni povas nun aldoni jenajn:
Prof. d-ro Gyula Ortutay, membro de la Prezidio de la Hungara Popola Respubliko, Prezidanto de la Scienca Popolkleriga Instituto TIT, akademiano. Prof. d-ro Hans Furler, vic-prez. de la Eŭropa Parlamento. Dimitrios Thanopoulos, eks-vic-prez. de la Greka Parlamento. Per Borten, Ĉef-Ministro de Norvegujo. Pedro Gervasio Fleitas, Ŝtata Sekretario pri Transporto, Argentino, Vic-Prez. de la Argentina Asocio por U.N.; F. Grootjans, Ministro pri Nacia Edukado kaj Kulturo, Belgujo; Helge Seip, Ministro pri Urbaj kaj Laboristaj Aferoj, Norvegujo; Egil Aarvik, Ministro pri Sociaj Aferoj, Norvegujo; Kjell Bondevik, Ministro pri Ekleziaj Aferoj kaj Edukado, Norvegujo. Jens Smorum, Eks-Ministro pri Agrokulturo, Danlando; Rasmus Hansen, Eks-Ministro pri Defendo, Danlando; Michael Gam, Eks-Ministro pri Gronlando, Danlando; Jørgen Jørgensen, Eks-Ministro pri Instruado, Danlando; Mogens Fog, eks-ministro, Danlando; Ĥr. Solomonidi, eks-ministro, Grekujo; Halvard Lange, Eks-Ministro pri Eksteraj Aferoj, Norvegujo; Helge Sivertsen, Eks-Ministro pri Edukado, Norvegujo; Trygve Lie, eks-ministro, Norvegujo, unua Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj; P. O. Skoglund, Eks-Ministro pri Edukado, Nov-Zelando; Sir Eruera Tirikatene, K.C.M.G., eks-ministro, Nov-Zelando. François Mitterrand, Prez. de la Unuiĝo Demokrata kaj Socialista de la Rezisto, Francujo; Palkó sándor, membro de la C.K. de la Hungara Socialista Laborista Partio; N. V. Douglas, Prez. de la Laborista Partio, Nov-Zelando. M. Gunnar Thoroddsen, Ambasadoro de Islando al Danlando; Guido Lepori, Ambasadoro de Svislando al Jugoslavio. La Urbestro de Antwerpen, Belgujo. Prof. d-ro inĝ. Jaroslav Heyrovský, Nobel-Premiito pri Polarografio, Direktoro de la Polarografia Inst. de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj.

La listigon de eminentuloj kaj gravaj organizaĵoj ni daŭrigos en posta eldono de "Esperanto". Daŭrigu la kolektadon !

# ITALAJ STUDENTOJ KAJ LA LINGVA PROBLEMO

Du italaj Esperanto-societoj lastatempe iniciatis interesan enketon ĉe 128 studentoj de la Universitato de Torino kaj ĉe 1050 mezgradaj lernantoj en Asti. Sube ni publikigas la enketon kaj la respondojn de la studentoj en Torino. Kvankam la absoluta nombro de demanditoj ne estas sufiĉe granda por esti vere reprezenta, tamen la ekzemplo povas instigi aliajn organizaĵojn entrepreni similajn enketojn.

1. Ĉu laŭ vi la lingvaj diferencoj en la moderna mondo prezentas obstaklon:
(a) al ekonomia evoluo ? — Jesis 59%
(b) al kultura integriĝo ? — Jesis 84%
(c) al interpopola proksimiĝo ? — Jesis 88%
2. Ĉu vi opinias, ke tiun problemon povas solvi la adopto de internacia lingvo flanke de la naciaj lingvoj? — Jesis 64%
3. Ĉu vi opinias, ke la adopto por tia rolo de iu nacia lingvo (ekz. la angla, franca, germana) povas doni al la favorita nacio ian hegemonion:
(a) kulturan? — Jesis 72%
(b) ekonomian? — Jesis 34%
(c) politikan? — Jesis 31%
4. Ĉu vi opinias ebla, ke la ŝtatoj akceptus nacian lingvon en tia funkcio? — Jesis 29%
5. Ĉu vi opinias, ke mortinta lingvo (latina, antikva greka) povus plenumi tian rolon? — Jesis 7%
6. Ĉu vi kredas, ke planita lingvo, bazita sur naturaj radikoj, povas funkcii kiel lingvo vivanta, en ĉiuj aspektoj? — Jesis 58%
7. Ĉu vi estis informita pri la ekzisto de Esperanto, kiel lingvo vivanta jam 79 jarojn, kun vasta literaturo, kaj uzata nuntempe de milionoj da homoj tra la tuta mondo? — Jesis 70%
8. Ĉu vi opinias, ke la problemon de internacia lingvo devus pli serioze konsideri la edukaj instancoj kaj la lingvistikaj fakultatoj de italaj universitatoj ? — Jesis 95%

☆

Kiel dirite, estus nesaĝe, tiri firmajn konkludojn el tiel malgranda enketo. Tamen tia enketo en si mem havas en ĉiu okazo tiun valoron, ke ĝi samtempe informas pri Esperanto elektitan publikon kaj donas okazon por personaj kontaktoj. Due, se sufiĉe ampleksa, ĝi povas indiki, kie troviĝas la mankoj en nia informa laboro. Enketoj faritaj tuj antaŭ kaj tuj post iu informa kampanjo povas ankaŭ doni indikon pri ĝia efikeco.

Unu rimarkon ankoraŭ: la demandaro prefere estu klara kaj fakteca. Nepruveblaj asertoj pri "milionoj" da esperantistoj estas evitindaj.

**Anita Engle**

# ĈU VITRO-PRODUKTADO KOMENCIĜIS EN ISRAELO ?

Kiu ne uzas vitron, bezonas vitron, amas vitron ? Sed ĉu vi scias, kiu, kie kaj kiel, inventis vitron ? Ne estu ĝenata, se vi ne scias la respondojn. Kvankam vitron oni uzas jam de eble 5 000 jaroj, la kieo kaj kielo de ĝia eltrovo restas ankoraŭ inter la plej firmaj sekretoj de la antikveco.

Unu parteto de Israelo, nome la marborda regiono de Okcidenta Galileo, havas ligojn kun vitro-farado jam de tre antikvaj tempoj. Tie oni povas en duona tago viziti lokojn ligitajn kun la disvolviĝanta vitro-industrio ekde ĝia plej frua komenciĝo ĝis la malfrua romia-bizanca periodo (4a-7a jc. p.K.), kiam Okcidenta Galileo estis grava fonto de sablo, vitro kaj vitraĵistoj ĝis kaj eĉ trans ĉiuj limoj de la Romia Imperio.

La plej antikvaj tradicioj de vitro-farado, pri kiuj ni havas informojn, centriĝis ĉirkaŭ la mistera rivereto Belus. Hodiaŭ nomata Naaman, ĝi enfluas la maron tuj ekster la muroj de la antikva urbo Ako.* Kvankam transiras ĝin la ĉefa ŝoseo al Hajfa, malmultaj konscias ĝian ekziston, ĉar ĝi aspektas tute sensignifa. Sed ĝuste tiu rivereto enskribiĝis en la historion kiel la fonto de la plej bona vitro-sablo de la antikva mondo.




La historiisto Plinio rakontas, ke la invento de vitro-farado okazis ĉe la elfluejo de Belus, kaj asertas, kvazaŭ ĝi estis konata fakto, ke "dum multaj jarcentoj la produktado de vitro dependis de tiu regiono sola".

Kvankam tio povas ŝajni troigo, ĝi akordiĝas kun nia scio pri vitro-produktado en antikveco. La plej fruaj vitraj ujoj — la bele koloritaj ungvento-vazetoj el Egiptujo — aperas nur post la konkero de tiu regiono fare de Tĥutmoseo la Tria, ĉ. 1 500 jarojn antaŭ Kristo.

La faraonoj de la 18a Dinastio uzis Akon kiel unu el la ĉefaj havenoj, el kiuj ili fluigadis la ĉiujarajn tributojn — valoraĵoj, metiistoj, sklavoj — de la komercistoj-princoj de la lando Kanaana. En la listoj de tributaĵoj el tiu regiono estas registritaj "multaj 'brilŝtonoj' ". Tion indikas mistera hieroglifo, kiu enhavas la determinanton de fajro, signifanta do "fanditan ŝtonon".

Oni povas demandi al si, ĉu inter la sklavoj, kiuj eskapis el Egiptujo kune kun la Izraelidoj, eble estis praidoj de la metiistoj, kiujn la glora 18-a Dinastio tiel abunde transportadis el Fenikio dum 200 jaroj. Se jes, do facile povas esti, ke la eks-sklavoj revenis al sia iama patrujo. Ĉar tie, apud la rivero Belus, estas la loko, kiun la Biblio unuafoje aludas kiel vitro-farejon.

---

* Vidu la kovrilan bildon de "Esperanto", 1966, juli-aŭgusto.



*Hajfa — havenurbo jam de la tempo de Reĝo Salomono, antaŭ 3000 jaroj.*

La aludo koncernas la tribon Zebulun, kiu laŭsupoze loĝis tiun regionon — tiam, same kiel nun, centro de komerco kaj eksportado.

Zebulun, laŭ la beno de Moseo en Readmono 33.19, "nutras sin per la riĉaĵo de la maro, kaj per trezoroj, kaŝitaj en la sablo". Ŝajne neniam estis dubo, ke tio lasta aludas la valoran vitron faratan el la sablo, pro kiu la elfluejo de Belus estis bonfama. El tio do ni povas konkludi, ke jam en la tempo de la Unua Templo (do, ĉ. 950-585 a.K.) la farado de vitro estis unu el la metioj praktikataj de la judoj, kiuj loĝis en la marbordaj regionoj de Galileo.

Interesa estas ankaŭ Ŝikmona, kie troviĝis antikva havenurbo kelkajn kilometrojn sude de Ako. Ĝi estis prakomenco de la moderna urbo Hajfa kaj situas sur kabo sub la monto Karmel. Elfosoj en la citadela kvartalo, malgranda teramaso nur 13 metrojn alta de la marbordo, rezultigis trovaĵojn riĉe diversajn, kiuj atestas la uzon de Ŝikmona kiel haveno kaj industria centro jam de frua epoko. La plej malalta loĝnivelo ĝis nun malkovrita estas tiu de la 10-a jarcento a.K. — t.e. ĉirkaŭ la tempo de Reĝo Salomono.

En la nivelo de la 8-a ĝis la 7-a jarcentoj aperis fragmentoj de vitraj ujoj. Tiuj unikaj pecoj estas aparte gravaj, ĉar ili povas esti la plej fruaj specimenoj de tiuj "trezoroj, kaŝitaj en la sablo", kiujn mencias Readmono 33. El pli postaj jarcentoj la trovaĵoj estas abundaj, kio indikas, ke vitro-farado okazis tie dum longa periodo.

La mortigaj atakoj de asirianoj kaj poste babilonianoj tute haltigis la vitro-industrion en Izraelo, ĉar la vitristojn, kune kun aliaj metiistoj, ili transportis al Mezopotamio. En la 7-a kaj 6-a jarcentoj a.K. Mezopotamio havis la plej progresintan kulturon de la tuta antikva mondo. Tial, kiam la persoj konkeris tiun mondoparton, la izraelaj metiistoj aŭ ties posteuloj, revenante al la vitro-fabrikaj centroj de Okcidenta Galileo, kunportis la plej modernan teknikan scion el Mezopotamio.

Kelkaj faktoj supozigas, ke Aĥzib, marborda loko 16 km. norde de Ako, estis unu el tiuj antikvaj vitro-fabrikaj centroj, al kiuj la ekzilitoj revenis el Babilonio. Kvankam la historio ne mencias ĝin tre precize — ĉar ĉiam pli gravaj estis ĝiaj najbaroj Ako, unuflanke, kaj Tiro, aliflanke — tamen Aĥzib estis jam

tre frue grava urbo. (Josuo 19.29 kaj Juĝistoj 1.31). La elokventaj restaĵoj de antikva haveno estas ankoraŭ videblaj tie.

La Miŝnao mencias Aĥzib kiel tiun parton, "kiun okupis tiuj, kiuj venis el Babilonio en la tempo de Ezra". Ke Aĥzib havas vitrofabrikan tradicion, tion atestas la grandaj skori-pecoj el iamaj vitro-fornoj tie trovitaj. Ekzistas ankaŭ fragmentoj de diversspecaj kaj diversepokaj blovefaritaj vitraj ujoj, kolektitaj el inter la ruinoj de la malnova vilaĝo Aĥzib aŭ de sur la marbordo.

Ekde la persa periodo — t.e. ĉirkaŭ la 5-a jarcento a.K. — vitrofabrikado floris en Izraelo kaj atingis sian kulminon post la romia konkero en la unua jarcento. Tiu periodo estas esence grava en la historio de la vitro. Tiam oni eltrovis la teknikon de vitro-blovado, kaj el Izraelo kaj la ĉirkaŭaj regionoj tiu valora amas-produkta tekniko disvastiĝis tra la tuta romia imperio kaj ankoraŭ pli malproksime. Hebreaj skribaĵoj de tiu periodo ofte aludas al vitro-farado, kio montras, ke ĝi estis grava juda metio.

*Romia akvedukto proksime de la antikva urbo Ako, okcidenta Galileo. Pitoreskaj vilaĝoj hodiaŭ staras tie, kie jam antaŭ 1500 jaroj laboris vitro-metiistoj.*



La romianoj malfermis nesatigeblan merkaton kaj kreis pacajn cirkonstancojn, kiuj favoris la disvastiĝon de komerco tra la tiama mondo. Kelkaj opinias, ke neniam ĝis la hodiaŭa epoko la uzado de vitro estis tiel vasta. Inter la artikloj faratai el vitro estis teleroj, bovloj, vinboteloj kaj akvoboteloj, pletoj, peklujoj kaj konfitujoj, tasoj, kruĉoj, vazoj, senfine diversaj parfumboteloj, kosmetikujoj, laktofuneloj, urinujoj, sucboteloj, kuleroj, speguloj, enterigaj urnoj, ĉerkoj, arĥitekturaj ornamaĵoj, braceletoj, bidoj, ringoj, pezaĵoj por monerośnuroj. Specimenoj de preskaŭ ĉiuj ĉi artikloj troviĝas en la muzeoj de Israelo.

Kiel oni povus atendi, multe da vitro estis fabrikata en la ĉirkaŭaĵo de la rivero Belus, kiu ankoraŭ restas la ĉefa fonto de vitro-sablo por enlandaj kaj eksterlandaj bezonoj. Unike interesaj tiurilate estas la restaĵoj de du tiaj vitrofarejoj en Galileo.

Unu troviĝas ĉe Kfar Jasif, okulfrape pitoreska vilaĝo kelkajn kilometrojn norde de Ako. Nun loĝas tie mahometanaj kaj kristanaj araboj, sed en la talmuda epoko ĝi estis grava juda centro, kie studoj pri la Leĝoj okupis lokon apud agrokulturaj kaj industriaj laboroj. Inter la olivarboj kaj sur la plugitaj kampoj oni foje trovas grandajn pecojn da bluverda skorio, restaĵojn el vitrofornoj uzataj antaŭ eble 1 500 jaroj. La elfosoj jam parte malkovris unu fabrikon.

Kelkajn kilometrojn oriente de Hajfa, sudoriente de la rivero Belus, situas Bet-Ŝearim, kiu en la tempo de la Miŝnao estis homplena komunumo. Tie oni enterigis la grandan religian gvidanton kaj kompilinton de la Miŝnao, rabenon Jehuda la Princo, kaj Bet-Ŝearim diskoniĝis kiel religia centro por pluraj jardekoj. Oni alportis judojn el la tuta Proksim-Oriento por enterigo en la labirintaj katakomboj sub la monto, sur kiu staris la urbo.

Inter 100 kaj 325 p.K. la vitrofabriko de Bet-Ŝearim produktadis vitraĵojn inter la plej bonkvalitaj de la lando. La fabriko jam delonge malaperis, sed la skorio el ĝiaj fornoj estas ankoraŭ trovebla sur la ĉirkaŭaj kampoj, kien oni tiam ĵetis ĝin. Ĝi estas tegita de vitro tiel glata kaj brila, ke ĝi ankoraŭ aspektas kvazaŭ hieraŭ farita, kvankam ĝi kuŝis sub ĉia vetero dum preskaŭ 1 600 jaroj.

En unu el la kavernoj de Bet-Ŝearim oni elfosis ion, kio similas al vitro-fara instalaĵo. Kun ĝi troviĝis mistera vitro-bloko, peza ĉ. ok tunojn. Ĝi estas unu el la tri plej grandaj blokoj iam konataj, de kiu ajn epoko antikva aŭ moderna.

Kiel oni faris ĝin, kaj por kiu celo? Tion neniu scias. Sed estas certe, ke, kiam la vitro-restaĵoj de Bet-Ŝearim transdonos al ni ĉiujn siajn sekretojn, la mondo scios multe pli, ol hodiaŭ, pri la antikva vitro-industrio kaj ĝiaj ekonomiaj cirkonstancoj.

# IOM PRI LA AKUZATIVO

Louis Beaucaire

*Mi iras ekster la urbon*

En la Plena Vortaro oni legas jenan rimarkon pri "ekster": "Nelogika kaj evitenda estas la uzo de akuzativo post ekster, malgraŭ multaj Z-aj ekzemploj, ĉar la komplemento de tiu prepozicio neniam montras la celon aŭ la direkton de la movo".

Mirinde estas, ke tiu rimarko ne ripetiĝas en la Plena Vortaro ĉe aliaj lokaj prepozicioj, kiel "ĉirkaŭ", "trans", "super" k.a., kiuj ankaŭ tute ne montras kaj ne povas montri celon aŭ direkton.

Multaj gramatikoj forĵonglas tiun problemon kaj citas post la Fundamenta 13a regulo ("Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo") samtempe verajn ekzemplojn pri direkto

*Mi iras en la urbon*

kaj falsajn ekzemplojn

*Mi iras trans la kampon* (kvankam la kampo neniel povas esti la celo de mia irado, sed nur la vojo al mia celo, kiu troviĝas trans la kampo)

*Mi vojaĝas trans la Oceanon* (kvankam mia celo ne estas la Oceano, sed transa kontinento)

*La kuglo flugas tra la muro* (ĉar post tra" oni kutime uzas la nominativon), sed se oni pafas kelkajn centimetrojn pli alte, *la kuglo flugas trans la muron* (laŭkutima akuzativo). Kial?

Mi ja ne konas ĉiujn E-gramatikojn, sed en neniu mi trovis ĝis nun kontentigan klarigon pri tiu akuzativo. Se la 13a regulo tekstus: "Por montri direkton *aŭ lokŝanĝon...*", la problemo estus solvita. Sed oni ne rajtas ŝanĝi, eĉ aldone, la Fundamenton. Tamen, se en gramatiko ekzistas iu regulo, oni povas kompletigi tiun regulon per subreguloj, klarigoj, rimarkoj, korolarioj, k.t.p. Zamenhof mem faris tion en siaj "Lingvaj Respondoj", sed bedaŭrinde oni ne demandis lin pri ĉiuj punktoj de la Fundamento. La nunaj gramatikistoj povus eble ripari tiun mankon pri la 13a regulo, menciante, post la cito de la regulo kaj ties klarigo, jenajn du rimarkojn:

RIMARKO I: Oni ne bezonas uzi la akuzativon, kiam la almovo estas sufiĉe montrita per iu vorto (al, ĝis) aŭ per la kunteksto.

*Mi iras al Parizo*

*Saltego trans jarmiloj* (Titolo de romano de Jean Forge. Korektema recenzisto parolis pri "saltego trans la akuzativon", kvankam la lokŝanĝo estas klare esprimita sen akuzativo)

*Pensoj iras trans limo sen pago kaj timo* (En tiu proverbo de Zamenhof, la kunteksto sufiĉe montras, ke la pensoj transpasas la limon)

*Ili trempis la veston en la sango* (Ankaŭ Zamenhof preferis la nominativon en sia traduko de Genezo (1911), post kiam li uzis pli frue la akuzativon: *Ili trempis la veston en la sangon* (La Rabistoj, 1908)

*Flugilojn viajn super mi etendu*

RIMARKO II: Se lokaj prepozicioj havas du signifojn (lokŝanĝaj kaj nelokŝanĝaj), oni povas uzi la akuzativon por montri la lokŝanĝon.

*La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj* (Ekzercaro 26)

*Mia hundo kuras trans la straton* (de tiu ĉi trotuaro al la kontraŭa)

*Mia hundo kuras trans la strato* (restante sur la kontraŭa trotuaro)

*Mi iras ekster la urbo* (mi promenas sur la kamparo)

*Mi iras ekster la urbon* (de la urbocentro al la kamparo. Tiu frazo estas klara, Fundamenta kaj ne evitenda, kiel diras la Plena Vortaro, sed male nepre imitenda)

*Mi iras tra la urbo* (restante en ĝi, sen lokŝanĝo)

*Mi iras tra la urbon* (mi trapasas la urbon kaj forlasas ĝin, irante plu)

Se kelkaj gramatikistoj ne konsentos pri tiuj klarigoj, ili bonvolu diri kial. Mia teorio havas almenaŭ unu avantaĝon: ĝi ne anatemas iun aŭ alian kategorion de esperantistoj pro pretendita nekorekta uzo de la akuzativo, sed male lasas al ĉiu grandan liberecon konforme al la uzo kaj spirito de d-ro Zamenhof.

---

## NEKROLOGOJ

**VIOLINA STOIČKOVA**

Mortis antaŭ nelonge en aviadila akcidento apud Bratislava f-ino Violina Stoičkova, stevardino de TABSO, la bulgara aerlinio. En 1964 la TEJO-kongreso en Amsterdam nomis ŝin "Miss Esperanto". (Vidu 1964, dec. p. 220)

**LUISA PLZENSKÁ**

Mortis en Praha la 17-an de novembro 1966 Luisa Plzenská, kunlaborantino de Julie Šupichová en la "Rondeto de esperantistinoj" en Praha.

**KARL A. CLARK (1888-1966)**

Mortis 78-jara d-ro Karl A. Clark, delegito en Victoria, Kanado. Kiel petrolesplora inĝeniero li ellaboris la bazan proceson por 240-dolarmiliona ekstraktejo inaŭgurota en 1967.

**NINA IVANOVNA NIKIFOROVA (1894-1966)**

En Soveta Unio forpasis la 19-an de oktobro s-ino N. I. Nikiforova. En la jaroj 1940-50, kiam en Moskvo mankis organizita movado, ŝia hejmo estis kunvenejo por ĉiuj interesitaj pri Esperanto. Ŝi kompilis bibliografion de Esperantaj tradukoj de rusa arta kaj klasika literaturo.

**LASTMOMENTE:**

**Inĝ. J. R. G. Isbrucker forpasis, 77-jara, la 20-an de januaro 1967. Nekrologo aperos en marto.**

# EL LA BELARTAJ KONKURSOJ 1966

## François Villon

### BALADO DE KONTRAŬDIROJ

Soife mortas mi, apud la fonto;
Hejtita fajre, tremas dent' al dent';
En propra land', kvazaŭ en fremda mondo;
Ĉe forn' frostigas min tro arda sent';
Jen nuda mi, en vest' de prezident',
Kun plora rid', atendas sen espero:
Konsolas min plej trista malespero;
Mi ŝercas, sed ne estas ĝojesprim';
Sen fort' nek povo, regas mi sur tero,
Bonvena ĉie, ĉiam sen estim'.

Nenion fidas mi, se ne malcerta;
Obskuras nur la plena evident';
Mi dubas nur pri kio estas certa;
Mi spertas pro hazarda malatent';
Plej riĉa estas mi, sed sen arĝent';
Mi frumatene "bonan nokton" diras,
Kaj perdas, dum pri mia gajn' vi miras;
Kuŝante, fali estas mia tim';
Ne heredant', herede mi akiras,
Bonvena ĉie, ĉiam sen estim'.

Ne zorgas mi, sed penas mi en ĉio
Pri monakir', sen ia monpretend';
Min laŭdi estas fia kalumnio:
Mensogas, kiu pravas laŭ prudent';
Kredigas min amik', kun elokvent',
Pri nigra korv', ke blanka cigno venas;
Kaj kiu kredas helpi, plej min ĝenas;
Inter mensog' kaj vero mankas lim';
Memoras ĉion mi, sed ne komprenas,
Bonvena ĉie, ĉiam sen estim'.

Ho, milda Princo, ĉu vin interesas
Ke mi en saĝo pri stultec' konfesas,
Senleĝa, kaj de ĉiu leĝ' viktim'.
Nu, kio ? — Mi pri rekompenc' forgesas,
Bonvena ĉie, ĉiam sen estim'.

**El la meza franca: Wouter Pilger**

Per la supra traduko s-ro Pilger, nederlandano, gajnis la unuan premion en la branĉo Tradukita Poezio, dum per alia verko li la saman rangon atingis ankaŭ en Originala Poezio.

François Villon (1431-post 1463) estis franca "migranta studento" kaj poeto. "Soife mortas mi, apud la fonto" estis temo por kontraŭdira poemo en konkurso organizita de duko Charles d'Orléans (1391-1465). De tiu konkurso retroviĝis kelkdek verkoj, inter kiuj ankaŭ tiu ĉi de Villon.

---

*Wouter Pilger transprenas de prof. Waringhien la diplomon de sia unua premio en la Belartaj Konkursoj (Nova Talento, 1963).*

## Aŝvinikumar'

### KIAL VI MIN VOKIS ?

Vi vokis. Kaj mi venis al vi.

La sonoro de via senvoĉa voko penetris ĉiun arbofolion, ĉiun rosguton, ĉiun kurantan sciuron kaj filtriĝis en ĉiun mesaĝon de mutaj ŝtonoj. Frumatene la krepuskaj sunradioj portis vian vokon kaj la muto de via voko eksonoris en birdaj kantoj. Ekvespere en la ruĝo de survente glitantaj nuboj lumis la mesaĝo de via voko. Kiam bategis la pluvgutoj sur la benita tero-patrino kaj ĉio ŝajnis droni en inundo, la sereno de via voko vibrigis ĉiun molekulon de la aera terkovraĵo. Kiam mi naive malfermis la koron al la naturo, ĉiu naturero enverŝis la inspiron de via voko. Mian sangon ardigis la konstanteco de via voko. En infanaj manoj mi trovis la destinon de via voko. Kaj en profundaj okuloj de mia amata mi trovis la doloron de via voko. En silento de senhoma mateno mi trovis herbofolion flustranta la eĥon de via voko. Kaj en koro de homfrato mi trovis la koloron de via voko. En ĉiu signifero de metaforo mi trovis treman vibron de via voko. En homa pekemo mi trovis la firmecon de via voko. Kaj en mia animo mi trovis simbolon de via voko.

Altirita de la sopiro de via voko, mi venis al vi. Kaj nun diru al mi kial vi min vokis. Kial je mia demando respondo ne sonas ? Kial vi ne diras kio vi estas ? Kial vi ne lasas min scii la kialon de mia veno ? Kial vi vokis? Kaj kial min vokis? Diru al mi kial anstataŭ respondi vi nur turnas viajn mare profundajn okulojn vundesprime dolorplenajn kun arda peto kiel en okuloj de vundita cervino. Diru al mi kion vi de mi deziras.

Mia vivo ! Mi staras antaŭ vi.
Nun diru al mi kial vi min vokis.

☆

La supra prozpoemo estis nepremiita kontribuaĵo en la branĉo Originala Prozo. La aŭtoro, hindo, dufoje gajnis la pokalon Ivo Lapenna en la Oratora Konkurso. La bildoj kaj stilo de la verko devenas de hindaj literaturaj formoj.

# LA FILMO "INCUBUS"

La bela demonino Kia, fortedita de rutina laboro — damnado de pekoplenaj animoj — penas konkeri la animon de la justulo kaj piulo Marko, sed mem falas en la retojn de la Amo. La aliaj demoninoj petas helpon de Lucifero, kiu por venĝo sendas Incubus (¹). Ĉi lasta perfortas la fratinon de Marko kaj provas damnigi lin, sed Kia, definitive venkita de la Amo, eskapas el la povo de l' mallumaj fortoj kaj retrovas Markon sur la sojlo de l' preĝejo, dum Incubus transformiĝas en virkapron.

Ni do ĉeestis, kun William Shatner en la rolo de Marko kaj Milos Milos (kiu memmortigis sin antaŭ nelonge) en tiu de Incubus, mezepokan fabelon, por kiu la aŭtoro, Leslie Stevens, domaĝis nek la demonologian erudicion, nek la magian etoson, nek eĉ la realismajn detalojn. Laste, sed ne faste: belegaj fotoj kaj kelkaj scenoj, kiuj certe eniros la antologion de la fantasta kinarto (la suneklipso, la nigra meso, la naskiĝo de Incubus, kiu laŭvorte eliras el la tero...). Tekniko tre, eĉ tro, ellaborita, artisma, demoninoj certe ĉarmaj (Allyson Ames en la rolo de Kia), sed ŝminkitaj kaj kostumitaj kiel por varietea spektaklo. Ekspresionismo kaj intenca naiveco. La sveda skolo laŭ la modo de la usonaj kinistoj, ho ve! Kaj Leslie Stevens uzis Esperanton kiel fremdan, strangan, "neniean" lingvon, destinitan aldoni unu plian elementon al la etoso de mistero. Refoje ve!

En "Incubus", kian Esperanton parolas la ekrano! Unue, la ulo, kiu kunkudris la dialogojn evidente preteratentis certajn gramatikajn kaj sintaksajn regulojn de la lingvo. Due, la geaktoroj absolute ne kapablis elparoli la tekston. Imagu iun Esperanton, en kiu la akcento falas hazarde sur kiujn ajn silabojn, la vokaloj sisteme konfuziĝas, c prononciĝas kiel *k* kaj *ĝ* kiel *g*. Forglutu jen kaj jen tutajn vortopartojn kaj aldonu usonan akcenton, kaj vi ricevos etan imagon pri la amplekso de la lingva katastrofo. "Hispana lingvo elparolata de komencantoj en usona klaso", kiel trafe skribis recenzinto en *San Francisco Examiner*. "Stranga kaĉo", "stulta lingvo", jen kelkaj aliaj afablaĵoj de la parizaj ĵurnalistoj reage al la uzo de Esperanto en tiu lasta rondo de l' Infero. Aldonendas, ke la uzo de lingvo, kiun ili tute ne regas, videble ĝenas la geaktorojn kaj igas eĉ pli malnatura interpretadon jam sufiĉe artifikoplenan.

Mi komprenis proksimume la duonon de la dialogoj, dank' al laŭdinda orelostreĉo. La ceteron mi ŝuldas al la franclingva subteksto.

Esperanto kiel mistera lingvo? Diablo! (mi ja rajtas Lin alvoki ĉi-okaze, ĉu ne?) la celo estas atingita, eĉ preterpasita!

Michel Duc-Goninaz (Francujo)

---

(¹) *Inkubo* (latine: *incubus*, de *incubare*, kuŝi sur....): diablo, kiu prenis formon de viro por kuniĝi kun virino (P.V.) La ina formo estas *sukubo* (kp. la etimologion!), ignorata de la P.V., sed agnoskata de la Parnasa Gvidlibro. Eminentaj teologoj — inter ili Sta Aŭgusteno — asertis la ekziston de tiuj estaĵoj.

---

**Tagkajero en prizono,** de Ho chi minh. El la ĉina tr. Dao anh kha. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1966. 106 p. 19 x 13 cm., il. Poemaro.*

Ho chi minh, la prezidanto de Nord-Vjetnamujo, certe estas unu el la plej rimarkindaj homoj de nia epoko. Ĉiuj scias pri liaj kapabloj kiel politikisto, sed ke li ankaŭ kapable praktikis la poezion, ne estas tiel ĝenerale konate.

La libreto enhavas ĉ. 100 poemojn verkitajn, kiel indikas la titolo, en karceroj. En la Prezentado de la libro estas rakontite pri la aresto de Ho chi minh en Ĉinujo en 1942 fare de la polico de Ĉiang kajŝek, kaj pri liaj laŭvicaj enfermoj en diversaj ĉinaj prizonoj, ekstreme malplaĉegaj lokoj. En tiuj mizerejoj Ho chi minh notis poeme siajn ĉiutagajn impresojn, skribante en la ĉina lingvo per ĉinaj skribsignoj por ne veki ĉe la gardistoj nenecesan suspekton.

Plejparte la poemoj estas unuopaj kvarversaj strofoj, vivoveraj skizoj en la klasika ĉina stilo. La tradukado de tia originalo, tiel fremda al la okcidenteca stilmaniero de la Esperanta poezio, devas esti malfacila tasko. La tradukinto tamen ĝenerale sukcesis doni simpatian esprimon al la aŭtora tono, ĉu ankaŭ aŭtentikan estas neeble prijuĝi; la subskribinto tamen emas kredi tion surbaze de la oftfoja preskaŭ ĝisstumbla denso de la sencoroj, kiu ŝajnas atesti honestan klopodon transdoni fidele la sencenhavojn de la poemoj en ŝpareca formo.

Kiel esprimas sin en poezio tiel neordinara homo kiel Ho chi minh? Certe ne iel neordinare, sed simple, homece. Liaj observoj nature tre ofte limiĝas je la enkarceraj spertoj, sed neniam plende, kompatpete; nudajn, abomenajn faktojn li firme kaptas kaj mastras pere de kvieta humuro kaj alta moralo.

La titoloj de multaj el la poemoj cetere estas tre indikaj pri iliaj karakteroj: Malliberula manĝo, La katenoj, Frosta nokto, Brakoj kaj kruroj ŝnuritaj, Malpermeso fumi!, La skabio, Li volis forfuĝi, Kvar monatojn jam, Sendormaj noktoj, Permesita iri tien kaj reen ekster la prizono. Bela dokumento homa estas tiu verko.

Baldur Ragnarsson (Reykjavík)

* *Mendu ĉe UEA*

# KONFIDENCA DISKUTO: PROBLEMOJ NE NUR AFRIKAJ

**Mi amis junulinon**, de Walter Trobisch. Konfidenca korespondado. Eld. Editions Trobisch, Baden-Baden, 1966. 140 p. 18 x 12 cm. Bd. 7,20; br. 5,40 gld.*

Francisko, juna afrikano, estas eksigita de sia instruista posteno kaj elbarita de la Sankta Manĝo; li mem sentas en sia konscienco, ke li pekis: sed malgraŭ profunda enrigardo en sian animon li ne kapablas decidi, kia estas la peko, kaj kiel afrikano estus povinta alimaniere solvi la problemojn de la situacio, en kiu li troviĝis. Li turniĝas al sia antaŭa instruisto en la kristanaj lernejoj, kaj abrupte prezentas la problemon: li sekse amis junulinon promesitan al neniu alia: ĉu li pekis? Per tio komenciĝas interesega perletera interparolo, kiun rolas pastoro Trobisch, posta publicinto de la libro, kaj Francisko. La demandoj estas faritaj nude, skeme: la leteroj de Francisko estas plejofte mallongaj. La respondoj devas multon klarigi, multon citi, alfronti la demandojn el diversaj vidpunktoj: sed pastoro Trobisch ĉiam sukcesas fine proponi solvojn.

La komenca problemo estas la rilato de junulo al la sekso, kaj kiam mi mem devis alfronti persone tiun problemon, mi preskaŭ ĉiam alvenis post longa priesplorado al la samaj solvoj, kiujn tiel klare proponas la pastoro: tamen, se mi estus leginta ĉi tiun libron antaŭ dek jaroj mi estus povinta ŝpari longan kaj kelkfoje angoroplenan serĉadon.

Kiam Francisko konatiĝas kun la vera amo, afrika kutimo malpermesas al li edziĝi: la patro de la knabino postulas altegan sumon por sia filino. Cecilja kaj Francisko promesas sin unu al la alia, kaj ilia ĉefa problemo estas la pago de la "fianĉina prezo" al la patro de Cecilja; sed due: kiam oni vere amas, kial unu afero restas malpermesita ĝis la geedziĝo, kiu ja dependas ne de amo sed de mono? La solvon la du gejunuloj trovas draste, kiam la situacio riskas renversiĝi.

Ne mirigas min, ke tiu ĉi korespondado, origine franca, estis tradukita en pli ol dek eŭropajn kaj en tutan aron da afrikaj lingvoj: la problemoj pritraktataj estas ne nur afrikaj, sed homaj entute, kaj la legado de tiu ĉi libro estas aparte rekomendinda al gejunuloj. Nur en du-tri lokoj mi persone estus stile preferinta devojiĝon el la cetere bonega traduko de past. Burkhardt.

C.S.

---

**Universala skribo**, de Manuel Halvelik. Eld. la aŭtoro, Belgujo, 1966. 128 p. 21 x 15 cm., ofsetita. 7,— gld.*

"Universala Skribo" estas alfabeta sistemo, proponita, kiel sugestas la titolo, por universala uzo en la skriba reprezento de la parolo. La simbolaro konsistas el alfabetaj literoj, ĉiu kun aparta kaj konstanta signifo, modifeblaj pere de supersignoj. Ĝi celas servi al ĉiuj lingvoj, kaj por redoni precize la sonkvalitojn, kaj por provizi ortografiojn — bezonatajn, laŭ la aŭtoro, pro la arbitro kaj nekonstanto aktualaj de la ligo inter individuaj sonoj kaj literoj.

Ĝenerala normigo de tiu rilato estas efektive konceptebla. Sed tiu tasko — kaj eĉ pli la ellaboro de transskriba sistemo fonetika — postulas sufiĉan scion pri fonetiko kaj fonologio. Ke la aŭtoro eĉ minimuman scion ne havas, tio elstaras sur ĉiu paĝo. Plej gravas eble lia miskompreno pri la koncepto "fonemo". Tiu koncepto estas nete fonologia: li tamen aplikas la terminon en ĝenerala fonetiko, postulante, interne de la gamo de parolsonoj, ian sistemon de "fundamentaj sonoj", kiujn li nomas "fonimoj" (laŭ "normigita Esperanto"). Ĉiujn aliajn sonojn li nomas "fonetoj", konsiderante ilin nuancoj de la fundamentaj. Tiun tute senbazan teorion li apogas, ne per argumentoj, sed per same eraraj analogioj. Evidente okazis plena konfuzo inter fonetiko kaj fonologio. El tiu miskompreno fontas amaso da falsaĵoj, kiuj senbazigas tute la argumenton.

Eleanor Higginbottom (Cambridge)

**Ĉu ankaŭ vi scias?** de Éva Janikovszky. El la hungara: Sándor Szathmári. Koloril. László Réber. Eld. Corvina, Budapest, 1966. 40 p. 23 × 20 cm., bind. Legolibro por junaj infanoj.

Bonvena aldono al la Esperanta infana literaturo. Bele kolorita kaj presita. Tre rekomendinda donaco por juna esperantisto. La amaso da bildoj, kiuj temas ĉefe pri ĉiutagaj agoj, faciligas la faradon de demandoj kaj respondoj inter instruisto kaj lernanto(j). La stilo iomete memorigas pri tiu de 'La Eta Princo' de St. Exupéry.

Raif Markarian (Britujo)

**La akvo kaj la homo en Hungarlando.** Eld. Kontoro por Akvoafera Teknika Informado, Budapest, 1966. 48 p. 20 x 14 cm., il.

Diversmaniere la akvo ludis, kaj ankoraŭ ludas, gravan rolon en Hungarlando. Ĉi tiu libreto, helpe de multaj fotografaĵoj kaj pluraj mapoj (bedaŭrinde mankas klarigo por N-roj 1 kaj 2) detale rakontas pri la daŭra rilato inter la akvo kaj la homo. La aŭtoroj lerte prezentas informon pri, ekz., irigacio, kontraŭinunda ŝirmado, sanigaj varmaj fontoj, moviĝo de subtera karsta akvo, kaj sciencaj faktoj pri Lago Balaton. Mallonge, bela skizo por la nefakulo pri la hungarlanda hidrografio. Oni do gratulu la aŭtorojn, kiuj kompilis la verkon sub aŭspicio de la Landa Akvoafera Ĉefdirekcio, kaj ni estu dankemaj, ke oni decidis eldoni ĝin okaze de la 51-a U.K.

R. H. Osborne (Britujo)

**Kantoj de dek kvin sovetaj respublikoj.** Trad. diversaj. Eld. Komisiono de Sovetaj Esperantistoj, Moskvo, 1966. 76 p .20 x 14 cm., ofsetita. 1,50 gld.*

En ĉi tiu kolekto de 31 popolkantoj la kelkaj preseraroj estas ĝenaj, tamen plejparte negravaj. La silaba disigo estas nesistema, kaj troviĝas eĉ ĉi-rka-ŭe. Ofte la vortoj en la muzika teksto estas tro kunpremitaj, kelkfoje la muziko kontraŭ-akcentas la vortojn, aŭ la strofo sekvanta la muzikon malsimilas tiun presitan kun la muziko; kaj en la kanto "Dudaraj'" mankas du silaboj el la dua strofo. Ne plaĉas la uzo de la litero y sen ekspliko de ĝia prononco.

Tamen, jen libreto, en kiu solisto aŭ grupo povos trovi uzeblajn kantojn, se tiu nur estas preta fari la laboron de redaktoro.

Maŭrico Bale (Britujo)

## RICEVITAJ ELDONAĴOJ

**Natura nutrado,** de Ole Ramby. El la dana: Betty Larsen. Eld. SAT, Parizo, 1966. 14 p. 20 × 14 cm. 0,90 gld.*

**El Hombre en su Camino/La Homo sur sia Vojo,** krestomatia lernolibro de Manuel Fernández-Menéndez. Eld. La Bona Semisto, Montevideo, 1965. 373 p. 20 × 14 cm., bind., il. 14,40 gld.*

**Patrino kun fusilo,** de Ngujen thi. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1966. 121 p. 13 × 9 cm., kun frontispico. Batalrakonto.

**Simplaj floroj,** melodioj kaj tekstoj de Ramona van Dalsem. Eld. Dansk Esperanto Forlag, Åbyhöj, 1966. 24 p., 21 × 15 cm. 4,75 gld.*

**Vivu la granda proleta kultura revolucio.** Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 27 p. 15 × 9 cm. 0,25 gld.*

**Deŝiri la maskon de "Libereco, Egaleco kaj Frateco" de la burĝaro.** Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 21 p. 15 × 9 cm., 0,25 gld.*

**Katalogo de verkoj de Maŭ Zedong.** Eld. Libroservo de ĈEL, Pekino, 1966. 20 p. 13 × 9 cm.

**Wir lernen Esperanto,** de W. kaj H. Wingen. 7-a eld., Limburger Vereinsdruckerei, 1966. 72 p. 21 × 15 cm. 4,60 gld.* Germana lernilo.

**Intensiva kurso de Esperanto,** de T. Nakamura. Eld. Kosmo, Osaka, 1966. 40 p. 18 × 13 cm. Por japanoj, sed uzebla internacie.

**Indaj gefiloj de la Lao-popolo.** Batalrakontoj de diversaj aŭtoroj. Eldonejo Neo Lao Haksat, Hanojo, 1966. 99 p. 19 x 13 cm.*

**Esperanta komerca korespondado,** de George Papakis. Eld. la aŭtoro, Ateno, 1965. Eldonoj 5-lingva (542 p.) kaj 9-lingva (996 p.), 19 x 14 cm., ofsetitaj.*

**Alte tenu la grandan ruĝan flagon de la penso de Maŭ Zedong...** Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 30 p. 14 x 9 cm. 0,25 gld.*

**Pri "Trifamilia vilaĝo",** de Jaŭ venjuan. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 58 p. 14 x 9 cm. 0,40 gld.*

**Lerneja esprimaro Esperanta,** de Nagy istván. Eld. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1966. 20 p. 20 x 14 cm.*

**Elektitaj paroladoj kaj prelegoj,** de Ivo Lapenna. Eld. la aŭtoro, Rotterdam, 1966. 152 p. 21 x 15 cm., plaste bind. 11,— gld., 44 st.*

**Unesteno,** Universala Esperanta Stenografio, de J. J. Sturzenegger kaj H. Matzinger. Eld. Mondo, Zürich, 1966. 285 p. 21 x 15 cm., bind. 17,75 gld.*

**Bestkalendaro 1967.** Eld. Reinsteg-Verlag, Germanujo. 12 p. 42 x 30 cm., kun kolorpresitaj pentraĵoj. Tekstoj germana kaj Esperanta. Prezo: 3,60 gld. ink. afrankon, mendebla ĉe past. A. Burkhardt, 7261 Gechingen über Calw, Germanujo; pĉk 102549 Stuttgart.

**La Esperanta konjugacio,** de Teo Jung. Eld. Heroldo de Esperanto, Scheveningen, 1966. Dua parto, paĝoj 129-245, 27 x 21 cm. Prezo (ambaŭ partoj kune): 13,50 gld.*

**Himnaro Esperanta,** de Montagu C. Butler. Kvina eld. reviziita kaj pligrandigita, 1966. 205 p. 16 x 9 cm., tola kovrilo.*

**Terminaro pri mikroskopio kun krestomatio,** de E. Balech. Eld. ISAE, ĉe prof. B. Popović, Teknika Fakultato, Niš, Jugoslavio, 1966. 26 p. 30 x 22 cm., multobl.

**Ceramikaj produktejoj el Ĉeĥoslovakio.** Eld. ČKD Praha, Přerovské Strojírny, Esperanto ZK ROH, Přerov, Ĉeĥoslovakio. 16 p. 30 × 21 cm., koloril. Senpaga prospekto.

**Esperanto, lingvo internacia,** de Aleš Berka. Eld. Esperanto-Rondeto de Klubo Sklář, Vsetín, Ĉeĥoslovakujo, 1966. 74 p. 20 x 15 cm. Lernolibro por ĉeĥoj. 2,— gld.*

## LIBROJ PLEJ VENDATAJ EN 1966

Jen la plej vendataj libroj en diversaj kategorioj kaj la plej vendataj diskoj laŭ la mendoj plenumitaj ĉe la Libro-servo de UEA.

ELDONAĴOJ, KIUJN UEA DISVENDAS SUB FAVORAJ KONDIĈOJ:
Lernolibroj k.s.: *Privilegia vojo* (Setälä)
Belliteraturo orig.: *Verdaj donkiĥotoj* (Baghy)
Belliteraturo trad.: *Reĝo Lear* (Shakespeare)
Nefikciaĵoj: *Nederlando* (eld. Bruna)
Pri Esperanto: *Elektitaj paroladoj* (Lapenna)
Diskoj: *Internacia elparolo* (eld. UEA)

ALIAJ ELDONAĴOJ (DISVENDATAJ SUB NORMALAJ KONDIĈOJ):
Lernolibroj k.s.: *Teach Yourself Esperanto*
Legolibroj: *La verda koro* (Baghy)
Belliteraturo orig.: *La teatra korbo* (Baghy)
Belliteraturo trad.: *La cikoni-kalifo* (Babits)
Nefikciaĵoj: *La Nova Testamento*
Pri Esperanto: *Vivo de Zamenhof* (Privat)
Diskoj: *La Espero/La Tagiĝo* (japana)

Oni notu bone, ke la supraj listoj rilatas nur al la librovendado ĉe UEA kaj ne al la tuta Esperanta libro-merkato, pri kiu mankas statistikoj.
Aperas du apartaj listoj, ĉar ne eblas rekte kompari librojn vendatajn sub malsamaj kondiĉoj. La influo de la UK en Budapest estas klare videbla (kp. 1966, aprilo, p. 73). La Nova Testamento venkis en sia klaso per unu ekzemplero pli ol La Komunista Manifesto !

**52-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**

**Tel Aviv, 2-9 Aŭgusto 1967**

**Alta Protektanto:** Zalman Ŝazar, Ŝtatprezidanto de Israelo.

**Konstanta Adreso:** Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

## OFICIALA KOMUNIKO N-ro 4

**Situacio en Israelo:** El eksterlando venis leteroj al LKK petantaj informojn pri la nuntempa politika situacio en Israelo. Kvankam ekzistas certa strečiteco inter Israelo kaj la ĉirkaŭaj landoj, LKK konstatis el la leteroj, ke en eksterlando la bildo, kiun oni havas pri tiu situacio, estas troigita kompare kun la reala. LKK deziras informi ĉiujn interesiĝantojn, ke neniu danĝero ekzistas nuntempe por kiu ajn vizitanto al Israelo, kaj certe ne por turistoj. En ĉiu parto de la lando la vivo disvolviĝas en tute normala maniero, kaj absolute ne estas videblaj iuj ajn signoj de strečitecoj aŭ danĝeroj en la vivo de la lando. Pri tio povas atesti la Konstanta Kongresa Sekretario, kiel ankaŭ la miloj da eksterlandaj turistoj, kiuj nuntempe troviĝas en la lando. LKK petas ĉiujn interesiĝantojn komplete fidi je ĝiaj asertoj kaj tute trankvile plani sian vojaĝon.
**Honora Komitato:** Krom la antaŭe menciitaj, akceptis aliĝi ankaŭ s-ro Moŝe Koll, Ministro por Turismo, kaj d-ro Moŝe Avidor, Prezidanto de la Israela Nacia Komisiono por Unesko kaj Membro de la Plenumkomitato de Unesko.
**La Dua Bulteno** estos baldaŭ dissendita al ĉiuj aliĝintoj.

**Statistiko** (Ĝis 25 jan 67): Arg. 4, Aŭstral. 3. Aŭstrujo 8, Belg. 15, Braz. 2, Brit. 37, Bulg. 30, Ĉeĥ. 17, Dan. 17, Finn. 3, Fran. 104, Germ. 16, Hisp. 10, Hong. 1, Hung. 38, Isr. 69, Ital. 33, Jap. 4, Jug. 22, Kanado 3, Monako 5, Ned. 31, Norv. 6, NZ 1, Pol. 90, Portug. 2, Rum. 1, Sov. 3, Sved. 26, Svis. 9, Us. 23, Ven. 1. Entute (32 landoj): 634.

**19-a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO**
**Fulda, Germanujo, 6-12 majo 1967**

**Adreso:** Poŝtfako 700746, D-6 Frankfurt (Main) 70, Germanujo.

**Kotizoj:** Ĝis 15 marto 1967: 32,— germ. markoj Ĝis 20 aprilo 1967: 38,— g.m.

**Limdato** por aliĝo: 20 aprilo 1967.

**Programo:** Sabaton, ekzamenoj, laborkunsidoj, interkona vespero. Dimanĉon, diservoj, solena malfermo, ekzamenoj, bankedo, teatro. Lundon, komitato, vizito al entreprenoj, balo. Mardon, laborkunsidoj, prelego, ekskurso. Merkredon, ekskurso. Ĵaŭdon, laborkunsido, prelego, ekskursoj, distra vespero. Vendredon, ekskurso, solena fermo.

**Loĝigon** aranĝas LKK nur por aliĝintoj.

**Glumarko** dukolora kostas 3 int. respondkuponojn por ĉiu folio de 25 glumarkoj. Mendu ĉe LKK.

## ĈU ESPERANTO PENSIGAS KLARE?

Ĉiu fakultato bezonas propran lingvon. La matematiko progresis relative malrapide per la metodo de Eŭklido sed multe akceliĝis, kiam arabaj numeraloj kaj formuloj estis uzataj. La ĥemio havas sian simbolaron, la muziko sian grafikon. Faktoj kaj deduktoj tuj evidentaj per tiuj faklingvoj ne estas klaraj per la multvorteco de ordinara lingvo. Sur faka kampo do, oni pli rapide kaj precize pensas, se oni uzas taŭgan lingvon.

Estas mia tezo, ke Esperanto povas esti, por penso pri ĉiutagaj aferoj, kio estas speciala lingvo por difinita fako. Mia propra sperto konvinkis min pri tio.

Mi ne estas konata kiel homo de alta inteligento. Mi ne brile sukcesis en lernejoj. Tamen, kiam mi jam estis 63-jara, mi ricevis I.K. (Inteligento-Kvocienton) de 158 laŭ la sistemo Cattell. Tiu grado estas altega. Estas mia opinie sole unu klarigo de tiu fenomeno. Farante la ekzamenon mi, kiam tio helpis, pensis en Esperanto. Ties logiko helpis, dum la senlogikaĵoj de la angla lingvo konfuzis. Jen ekzemplo:

USEFUL is the opposite of (WORTHLESS, USELESS, OBSTRUCTIVE, DISLIKED).
UTILA estas la malo de (SENVALORA, SENUTILA, MALUTILA, MALŜATATA).

Anglalingve oni emas elekti la vorton "useless", ĉar la formo de la vorto konfuzas. (La ĝusta elekto estas "obstructive"). En Esperanto la elekto estas memevidenta.

Frank Goodliffe
Nottingham, Britujo, 23 nov 66

*Estus interese, se troviĝus aliaj iom objektivaj atestoj pri la influo de Esperanto al pensado.* — *Red.*

## KION ENHAVU "ESPERANTO"?

En "Esperanto" devas esti presataj informoj pri la tuta Esperanto-movado — stratoj, monumentoj, nekrologoj larĝaj ktp. — kiel tio estis farata antaŭ 2-3 jaroj. Tiam "Esperanto" denove havos sian valoron. Pri lingvoj bambam en Afriko, aŭ kazaĥa en Azio, aŭ tam-tam en praarbaroj en Brazilo neniu esperantisto havas iun ajn intereson.

Adolf Holzhaus
Usono, 26 nov 66

*La nombro de stratoj kaj placoj "Esperanto" aŭ "Zamenhof" kreskas nuntempe tiel rapide, ke ni decidis publikigi nur ilian statistikon de tempo al tempo. Ĉu la legantaro ĝenerale deziras pli longajn nekrologojn? Dubinde. Kvankam ne malmultaj legantoj ja havas intereson pri lingvoj, ni baldaŭ lasos ĉesi la artikolserion pri etnaj lingvoj.* — *Red.*

### CITAĴO

**Espero Katolika:** "Ĉiu Beatlo posedas 35 milionojn da steloj." — Ĉu kuponoj aŭ moneroj?

## LAŬLANDE

**Afriko**

• Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kunlabore kun alia organizaĵo CAROSI, organizas okulkuracan helpon al almenaŭ 1000 blinduloj en Afriko. Detale informas: S-ro J. A. Tuinder, Agado E3, Van Hulststraat 1, Ter Apel, Nederlando.

**Aŭstrujo**

• La 8-an de novembro vizitis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno la urbestro s-ro Bruno Marek.

**Ĉeĥoslovakujo**

• Okaze de la 100-jara datreveno de ĉeĥa poeto Petr Bezruč (kies ĉefverko aperos en 1967 en la serio Oriento-Okcidento de UEA), en Opava okazos de 7 ĝis 10 julio 1967 kultura festivalo en Esperanto, kun seminario, arta vespero, tuttagaj ekskursoj, pentro-ekspozicio ktp. Detale informas: Esperanto-rondeto de UK Ostroj, Opava, Na rybníčku 27.

**Ĉinujo**

• ĈEL skribis al UEA: "En septembro ni sciigis, ke iuj libroj jam elĉerpiĝis. Nun kun ĝojo ni informas vin, ke post klopodo ni denove havas la librojn je nia dispono." Temas pri "Noveloj de Lusin", "Ĉina Antologio", infanlibretoj k.s.

**Finnlando**

• La programon de la Esperanto-Konferenco de Finnlando en novembro, kie oni ĉefe diskutis pri organizado, lingvolernado kaj informado, riĉigis muzik- prelego de gasto Roland Dupuis el Svedujo.

**Francujo**

• D-ro Gaston Maillard, kredeble la plej malnova esperantisto vivanta (li lernis jam en 1892) fariĝis 90-jara.

**Germanujo**

• La germana federacia registaro informis per sia gazetara servo, ke germanaj lingvistoj ellaboros "bazan germanan" lingvon por uzo en eksterlanda instruado. Laŭ peto de la Instituto Goethe, la Fondaĵo Volkswagen disponigas por tiu celo 800 000 markojn (ĉ. 720 000 gld.).

**Hindujo**

• El la multaj centoj da lingvoj parolataj en Hindujo, la Konstitucio rekonas 14 por oficiala uzo. Nun, laŭ lastatempa amendo, ankaŭ la sindhia lingvo ricevis tiun pozicion. Tiel, ekzemple, sur hindaj monbiletoj estonte aperos teksto en 15 lingvoj en preskaŭ tiom da alfabetoj.

**Hungarujo**

• En la Sciencuniversitato Loránd Eötvös (Filologia Fakultato, Katedro de Ĝenerala Lingvistiko), komenciĝis je 15. okt. 66 oficiala trijara Esperanto-kurso, ses horojn semajne. Instruas d-ro I. Szerdahelyi, lernas 13 triajaraj gestudentoj. Sukcesintoj ricevos fine diplomon, kies tria fako estos "mezlerneja instruisto de Esperanto, lingvo kaj literaturo".

**Italujo**

• La itala parlamento prenis en konsideron leĝproponon, laŭ kiu Esperanto estus libere elektebla studobjekto en mezgradaj lernejoj, same kiel sep aliaj lingvoj. Ĝi transdonis la proponon al la kompetenta 8-a Komisiono pri Publika Instruado. La 3-an de decembro okazis sepminuta favora elsendo pri Esperanto kaj la leĝpropono en la tutlanda televidprogramo "7 tagoj ĉe la parlamento".

**Japanujo**

• Laŭ la ŝtata televido NHK, la Socialista Partio de Japanujo (opozicia partio) metis en sian programon de lernej-sistema reformo la devigan instruadon de Esperanto en elementaj lernejoj. (Vidu ankaŭ 1966, junio, p. 103)

## LAŬFAKE

**Korespondado**

• La revuo "Pen Friend" (Plumamiko), eldonata en Tokio, en sia lasta numero publikigis la fundamentan gramatikon de Esperanto en la lingvoj japana, franca, angla, rusa, pola kaj germana. (Adreso: POB 3, Edogawa, Tokio).

**Politiko**

• "Pacon en Vjetnamio" nomiĝas nova internacia gazeto pri la tiea milito, eldonata ĉe KLEG, Nakatu-hamadôri 3-10, Ooyodo-ku, Oosaka, Japanujo. Jarabono (4 ofsetitaj eldonoj) kostas 2,— gld.

**Tekniko**

• Dipl. inĝ. A. Warner, FD en Frankfurt, Germanujo, doktoriĝis per disertacio pri "Internacia interegaligo de faklingvaj frazaĵoj de la elektrotekniko; projekto de frazeologiaj principoj por la tekniko".

*Ĉe la fondo de la Esperanto-Klubo de la Universitato de Moskvo, 18 oktobro 1966, la Moskva Universitata Teatra Studio prezentis en Esperanto la verkon "Cimo" de V. Majakovskij. Spektis gastoj el Brazilo, Ĉilio, Estonujo, Hungarujo, Litovujo kaj Ukrainujo.*

# LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de**
**Tutmonda Esperantista Junulara Organizo**
**Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al**
**H. Bakker, Kastelenstraat 231,**
**Amsterdam Z, Nederlando**

## LA 23-a IJK EN NATANJA, ISRAELO, 9-16 AŬG. 1967

La Komitato de TEJO per skriba voĉdono nun akceptis la datojn de la 23-a IJK: ĝi okazos post la UK en Tel Aviv, dum 9-16 aŭg. Pri la loko oni jam decidis en Pécs: ĝi estos Natanja, "la perlo de Saron", situanta ĉe la Mediteranea marbordo, 30 km. for de Tel Aviv. Natanja estis fondita en 1929 kiel agrikultura kolonio. Nun ĝi havas 60 000 loĝantojn, estas mondcentro de la diamant-industrio, kaj (kio eble pli vin interesas) centro por amantoj de suno kaj maro.

Ne hezitu, kaj elspezu eĉ viajn lastajn monerojn por partopreni la 23-an kongreson, ĝui la jam faman amikecan atmosferon de niaj kongresoj, aktivi en la kongreslaboroj kaj pasivi sur la strando.

La landaj sekcioj instigu la partoprenon per premioj ĉe diversaj konkursoj lerna, literatura, oratora, deklama !

Aliĝilojn kaj pliajn informojn petu de: 23-a IJK de Esperanto, p.k. 380, **Natanja,** Israelo.

Kore vin bonvenigas la LKK: Uri Savir (prez.), Moŝe Ben-Porat (aganta vic-prez.), Aleks Cangaras (sekr.), Ŝulamit Schory (kasistino), kaj aliaj.

---

## TAEL, la Tutjapana Altlerneja Esp.-Ligo

kunvenis je 21 aŭg. en la kadro de la 53-a Kongreso de Japanaj Esp-istoj.

La partoprenantaj TAELanoj kolektiĝis el tuta Japanujo – sur unu foto.

## NATURSCIENCA SEMINARIO

Altnivela kiel kutime estis la 10a Internacia Seminario, organizita de Germana Esperanto-Junularo kaj okazinta en Münster/Vestfalio, 27.XII.66 - 3.I.67. Partoprenis ĉ. 80 junuloj kaj prelegantoj, el 14 landoj.

Temo de la seminario estis "La hodiaŭa mondpercepto de la naturscienco j". En la kadro de tiu ĝenerala temo prezentiĝis naŭ prelegoj pri diversaj naturscienc aj problemoj. Bazajn nociojn de cibernetiko prezentis Klaus Wandelt, klarigante la funkcion de memregantaj sistemoj, de ŝippilotado ĝis elektrona kalkulado. Prof. Popoviĉ skizis nian nunan scion pri la makrokosmo (astronomio, kosmoesplorado) kaj mikrokosmo (atomfiziko). Aliajn flankojn de tiuj samaj aferoj traktis prof. Peevski (kosmonaŭtiko), prof. Strassl (astronomio, montrado de filmoj faritaj de Ranger VIII kaj IX pri la luno), kaj prof. Lapenna (juraj aspektoj de kosmonaŭtiko); d-ro Gula (atomfiziko). Nunan mondpercepton de la biologio eksponis d-ro De-Smet, kaj kelkajn ties praktikajn konsiderojn prilumis d-ro Albault (rilatoj inter malsato kaj multiĝo de infanoj). Pri geologio parolis prof. Kääriäinen, kaj la evoluon de la scienca mondbildo dum la 20-a jarcento iel resumis inĝ. Jotuni.

Ekster la prelegoj okazis kompreneble diversaj aliaj aranĝoj: promenoj, novjara balo, distraĵoj k.c. Plurhora diskuto okazis pri aktualaj politikaj problemoj en deko da landoj: diskuto aparte pro tio vigla, ke partoprenis homoj kun politikaj opinioj etendiĝantaj de ekstrema dekstro ĝis ekstrema maldekstro.

Eksterkadra prelego de prof. Lapenna eksponis la gravecon de la Principaro de Frostavallen. Modelan aplikon de tiuj principoj montris la Podia Diskutado, kiu okazis en la universitato inter la prelegantoj de la seminario kaj tri profesoroj de la universitato Münster. Ĝin ĉeestis la Rektora Moŝto mem de la Universitato, kiu poste akceptis la partoprenintojn kaj ĉeestintojn. Jam pli frue ankaŭ la urbestro de Münster akceptis la seminarianojn en la sama ĉambro de la urbodomo, kie estis subskribita la Traktato de Vestfalio.

La partoprenantoj de la Seminario tre komforte loĝis kaj manĝis en la Junulargastejo Münster. Germana Esperanto-Junularo meritas varman gratulon kaj dankon pro la tuta aranĝo.

J. C. Wells

## GUANABARA ESPERANTO-JUNULARO RAPORTAS

Dum la tria trimestro de 1966 GEJ daŭrigis sian intensan agadon. Jen kelkaj eroj: Post la sukceso de la unuaj kursoj oni starigis tri novajn kursojn en diversaj medioj.

Post intensa informado enskribiĝis entute 57 personoj. En la kadro de la ekskursa programo de GEJ oni vizitis ankaŭ Esp-kursojn

en aliaj partoj de la lando.

GEJ organizis plurajn kunvenojn (i.a. "Nokto de l' Amuzo"). Ĝi ĉiam ricevas apogon ĉe tio de la Prezidanto de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en Rio de Janeiro.

La estraro de GEJ kunvenis 6-foje kaj la bulteno "Meteoro" aperis unu plian fojon.

La informado en publikaj medioj estis aparte sukcesa. Ĵurnaloj kaj radiostacioj larĝe utiligis la informojn senditajn al ili, i.a. okaze de la novaj kursoj de Esp-o kaj okaze de la vizito de Ruben Feldman, la prezidanto de Arg EJO. La televido ankaŭ lin intervjuis.

En Esperanto-Seminario, organizita de la Kultura Kooperativo de Esp-istoj, la anoj de GEJ aktive partoprenis. Ili prelegis i.a. pri la Esp. literaturo, pri "Esperanto kaj ĝia disvastigo en la religiaj medioj", kaj raportis pri la ekzistado kaj agado de GEJ. La televido elsendis intervjuon pri la seminario, kaj tio rezultigis la starigon de E-konkurso en tiu televidstacio dum du monatoj pri parolarto, poezio, kaj kantado en Esp. Pluraj membroj de GEJ partoprenis en la oratoraj konkursoj kaj alibranĉe.

Jen nur ĉerpo el la tuta raporto, kiu respegulas la kuraĝigan aktivecon en Latinameriko, de GEJ kaj ArgEJO. Raportis Aloisio Sartorato, helpanta sekr.-kas. de GEJ.

## FERVOJISTA JUNULARO KONGRESOS

En Germanujo (urbo Fulda) en majo 1967 kunvenos la Internacia Fervojista Esp. Federacio (IFEF). La junulara sekcio de IFEF aranĝos apartan programon por la junaj kongresanoj. Internacia IFEF-teamo futbale defios lokan teamon. Por defendantoj de la esp. honoro ankoraŭ estas lokoj en la teamo: bonvolu skribi al d-ro Imre Ferenczy, **Györ** 2, Pf. 143, Hungarujo.

Dua programero estas renkonto kun la loka junularo, kiu jam proponis temojn por diskuto. Ili estas ekz.: "Organizado kaj celo de la junulara laboro en la landoj de la partoprenantaj junuloj" kaj: "Kiel oni povus interkontaktiĝi ĉu kun, ĉu sen Esperanto ?"

Krome estos dancoj, pantomimoj, kantoj, filmoj, ktp. Ĉiujn informojn petu de d-ro Imre Ferenczy.

## STUDENTA SCIENCA RONDO en GDANSK

Studentoj de la Teknika Altlernejo, de la Medicina Akademio kaj de la Pedagogia Instituto en Gdansk studas Esp-on kaj fondis Stud. Sciencan Rondon. Ilia programo enhavas diskutojn kaj kursojn, kaj skriban kontaktadon kun eksterlandaj studentoj. Adreso: SSR, W. Pataszewski, Politechnika Gdanska, ul. Majakowskiego 11/12, Gdansk-Wrzeszcz.

## MEMORIGA KALENDARO

**Februaro**

11-25 Skirestadoj en Krimml, Aŭstrujo

**Marto**

11 Int. renkontiĝo, Foiro de Leipzig
23-26 Argentina Kongreso, Buenos Aires
24-31 Kultura Semajno, Grésillon, Francujo
31 Limdato por Belartaj Konkursoj
Kotizoj por UK Tel Aviv plialtiĝas

**Aprilo**

14 50-a datreveno de morto de Zamenhof
28-3/5 Int. Jun. Seminario, Toruń, Polujo
29-10/5 Int. Ferioj, Pula, Jugoslavio
30 Limdato kandidatiĝo Int. Ekzameno

**Majo**

6-13 IFEF-Kongreso, Fulda, Germanujo
12-15 Franca Kongreso en Calais
13-16 Germana Kongreso en Hamburg
26-29 Brita Kongreso, Glasgow, Skotlando

**Junio**

2-4 Renkontiĝo-seminario, Plzeň, Ĉeĥ.
22 Limdato por aliĝo al UK Tel Aviv
30-2/7 Kanada Kongreso, Trois-Rivières

**Julio**

1-9 Renkontiĝo en Poděbrady, Ĉeĥoslovakujo
2-10/9 Sezono de Grésillon, Francujo
3-9 Ornitologia Semajno, Woumen, Belg.
7-10 Kultura Festivalo, Opava, Ĉeĥ.
8-15 Somera Universitato, Gyula, Hung.
17 Turista Festo, Monto Vitoŝa, Bulg.
22-29 KELI-Kongreso, Torre Pellice, Ital.
23-30 Eŭropa Kongreso, Innsbruck, Aŭstr.
23-30 Int. Feriaj Kursoj, Helsingør, Dan.
29-5/8 SAT-Kongreso, Malmö, Svedujo
29-9/8 Balta Tendaro, Vilnius, Litovujo
31-12/8 Int. Feria Seminario de Blindaj Esperantistoj, apud Köln, Germanujo

**Aŭgusto**

2-9 52-a Universala Kongreso, Tel Aviv
9-16 TEJO-Kongreso, Natanja, Israelo
10-20 Int. Pedagogia Seminario, Szeged, Hung.
18-20 STELO-Kongreso, Toruń, Polujo
19-29 Eŭropa Jun. Konf., Enkhuizen, Ned.
20-28 Turisma Jun. Kunveno, Bydgoszcz, Pol.

## ESPERANTO EN RADIO

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por pliaj detaloj vidu la januaran numeron.

**BBC daŭrigas** siajn eksperimentajn Esperanto-programojn almenaŭ ĝis marto 1967. La dissendoj do okazos ĉ. 21.30 h. laŭ Greenwich, la 23-an de februaro kaj 30-an de marto. Metroj: 49; 41; 31. Mcs: 5,99; 7,26; 9,77. Adreso: BBC, Bulgara Servo, London, Britujo.

**Praha rekomencas** Esperanto-elsendojn ĉiumerkrede je 9.30 h. MET (8.30 GMT). Ondoj: 31,56 m (9505 kcs) kaj 49,55 m (6055 kcs). (En la kadro de germana programo).

**Wien ŝanĝis la horojn:** Aŭskultu estontece vendrede je la 15.30 h. MET (14.30 GMT) dekminutan Esperanto-programon per metroj 203; 46; 25.

## EKZAMENO EN TEL AVIV

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos kandidatojn en Tel Aviv okaze de la UK. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomiĝo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi kiel eble plej frue (limdato la 1-a de majo) al la Centra Oficejo de UEA: esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas du usonaj dolaroj (7,20 gld.) aŭ egalvaloro, kaj devas esti pagita samtempe. Por kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, ekzistas ebleco de speciala aranĝo.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas ricevebla de la C.O.

## STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de decembro 1966 kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de decembro 1965:

| | 1965 | 1966 |
|---|---|---|
| Asociaj membroj | 24 081 | 24 573 |
| Individuaj membroj | | |
| MJ | 923 | 913 |
| MA | 4923 | 5085 |
| MS | 367 | 363 |
| Pat. | — | — |
| DM + D.Pat. | 575 | 666 |
| HM | 34 | 33 |
| J-MJ | 42 | 50 |
| J-MA | 219 | 215 |
| MA-K | 165 | 169 |
| | 7 248 | 7 494 |
| | 31 329 | 32 067 |

La statistiko montras kreskon de 738 membroj, el kiuj 246 estas individuaj membroj. El tiuj lastaj, i.a. 162 estas MA, kaj ne malpli ol 91 estas novaj dumvivaj membroj ! La ciferoj montras belan kreskon, sed tamen ni ne rajtas kontentiĝi, ĉar ne estas atingita la celo, kiun ni havis antaŭ la okuloj, kiam ni lanĉis fine de 1965 la kampanjon por nova milo. En ĝi, kelkaj niaj membroj donis tre belan helpon, sed multaj aliaj restis tute inertaj. Pro tio, la Komitato estis devigita iom altigi la kotizojn por 1967, kio ne estus necesa, se ĉiuj membroj vere solidare aktive helpus por pligrandigi la membronombron.

Ni apelacias al absolute ĉiuj membroj, en ĉiuj kategorioj, plej energie varbi novajn individuajn membrojn. La statistiko montras nombron de 24 573 asociaj membroj. Tio signifas, ke 24 573 esperantistoj partoprenantaj la organizitan Esperanto-movadon ne estas individuaj membroj de U.E.A., ne konas la revuon Esperanto nek la jarlibron, ne aktive subtenas la oficialan internacian Esperanto-organizaĵon, kiu povas plenumi siajn taskojn nur kun ĉies helpo, mallonge, 24 573 esperantistoj ankoraŭ ne sentas sian esperantistecon esence internacie. Devas esti ebla, varbi el tiuj preskaŭ 25 mil esperantistoj almenaŭ unu milon por UEA ! Se ĉiu — sed vere ĉiu — faros sian eblon.

M. H. Vermaas
Direktorino, C.O.

## LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1966

### REZULTO

**Konkurso I**

| | | lando | kvoto | poentoj | % |
|---|---|---|---|---|---|
| 1. | | Hispanujo | 2860 | 3250 | 113,64 |
| 2. | | Usono | 4526 | 4519 | 99,85 |
| 3. | (14) | Japanujo | 3965 | 3900 | 98,36 |
| 4. | (3) | Britujo | 6691 | 6451 | 96,41 |
| 5. | (4) | Belgujo | 2055 | 1960 | 95,38 |
| 6. | (5) | Francujo | 7752 | 7277 | 93,87 |
| 7. | (6) | Germanujo | 7221 | 6515 | 90,22 |
| 8. | (7) | Svedujo | 7180 | 6465 | 90,04 |
| 9. | | Nederlando | 5975 | 5166 | 86,46 |
| 10. | (8) | Danlando | 3099 | 2650 | 85,51 |
| 11. | (10) | Italujo | 4253 | 3420 | 80,41 |
| 12. | (11) | Finnlando | 3160 | 2490 | 78,80 |
| 13. | (12) | Svislando | 2459 | 1880 | 76,45 |
| 14. | (13) | Brazilo | 4142 | 3062 | 73,93 |
| 15. | | Jugoslavio | 5560 | 3400 | 61,15 |

**Konkurso II**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1. | Kanado | 842 | 1124 | 133,49 |
| 2. | Israelo | 460 | 595 | 129,35 |
| 3. | Sudafriko | 250 | 260 | 104,— |
| 4. | Grekujo | 270 | 266 | 98,52 |
| 5. | Aŭstralio | 1475 | 1385 | 93,90 |
| 6. | Nov-Zelando | 1481 | 1355 | 91,49 |
| 7. | Aŭstrujo | 1475 | 1295 | 87,80 |
| 8. | Norvegujo | 1755 | 1430 | 81,48 |
| 9. | Islando | 250 | 185 | 74,— |
| 10. | Argentino | 905 | 630 | 69,61 |
| 11. | Madagaskaro | 250 | 70 | 28,— |

(Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn).

Venkis do Hispanujo kaj Kanado, al kiuj ni plej kore gratulas, precipe al iliaj aktivaj ĉefdelegitoj s-roj Molera kaj Hackett, al kies persista laboro la sukceso grandparte ŝuldiĝas. Je dispono de ambaŭ landoj estas, kiel kutime, librodonaco en la valoro de 100,— gld. Hispanujo estas aparte gratulinda, ĉar ankaŭ en 1964 ĝi gajnis la premion. Des pli ĝojiga estas la rezulto, ĉar ĝi certe estas bona aŭguro por la sukceso de la 53-a Universala Kongreso ja okazonta en Hispanujo. Kiel konate, U.K. bezonas grandan nombron da surlokaj kaj enlandaj esperantistoj. Ju pli bone la movado solidiĝas kaj kreskas en la antaŭkongresaj jaroj, des pli esperplena tio estas por la koncerna Kongreso.

Ni bedaŭras, ke nur kelkaj landoj atingis pli ol 100% kaj ke kelkaj fortaj landoj eĉ grave postrestis. Aliflanke relative multaj kotizoj 1966 atingis nian oficejon ankoraŭ post la jarfino. Ili kompreneble validas por la statistiko, sed ili ne plu validas por la konkursoj. Ni ankoraŭfoje petas niajn membrojn nepre frue pagi la kotizojn, kaj precipe ni petas ankaŭ la aliĝintajn landajn asociojn, pli frue sendi al ni la kotizojn por la asociaj membroj (AM) !

Kaj nun, ek al la Konkursoj 1967 ! Kiel kvoto validas la plej alta poentaro atingita de ĉiu lando en la lastaj kvin jaroj. La poentoj estas donataj laŭ jenaj valoroj: AM = 1 poento; MJ kaj J-MJ = 5 pt; MA-K kaj J-MA = 10 pt; MS = 15 pt; Pat kaj DM = 50 pt.

Kun bondeziroj por granda sukceso,

M. H. Vermaas
Direktorino, C.O.

## NOVAJ DELEGITOJ

Vidu la Jarlibron 1967/I, aperontan en marto.

## NE PLU VALIDAS (EN JARLIBRO 1966)

**Argentino.** Buenos Aires: VD.
**Aŭstralio.** Brisbane: D.
**Aŭstrujo.** Gross-Siegharts: FD (Kortbestobredado).
**Belgujo.** Antwerpen: FD (Urba purigado).
**Britujo.** London: FD (Edukado), FD (Lingvoj). Tayport: D.
**Francujo.** Wattrelos: D & FD.
**Germanujo.** Duisburg: FD (Fervojoj). Hamburg: D & FD (Polico), (Sindikataj aferoj). Klarenthal: D. Passau: D. Verden: D.
**Kanado.** Victoria: D.
**Nederlando.** Bergen: FD (Instruado). De Bilt: D & FD. Kerkrade: D & FD. Leiden: FD (Paco), (Religio).
**Norvegujo.** Oslo: FD (Arĥitekturo).
**Pollando.** Bydgoszcz: D & FD (Kooperativismo).
**Svisujo.** Chur: D & FD.
**Usono.** Gray: D & FD.

## NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Abonnel, s-ro Claude, Montmorency, Francujo.
Addis, s-ro J. C., Dublin, Irlando.
Braun, d-ro A., Hauterive, Svisujo.
Cornet, s-ro Lucien, Paris, Francujo.
Douma, f-ino J. S., Deventer, Nederlando.
Hackett, s-ro W. D. B., Toronto, Kanado.
Hjorth, s-ro Ragnar, Vällingby, Svedujo.
Jouis, s-ro Edgard, Boisguillaume, Francujo.
Manteca, s-ro Manuel, Icod, Hispanujo.
Markarian, s-ro R. H. M., Chorley, Britujo.
Middelkoop, f-ino A., Hilversum, Nederlando.
Moberly, s-ro E. W., London, Britujo.
Olsen, s-ro Henning, Kolby Kaas, Danujo.
Philip, s-ro Alex, Hudson's Hope, Kanado.
Schindler, s-ro Heinz, Schwelm, Germanujo.
Skaftfell, s-ro Baldvin, Reykjavík, Islando.
Solá, s-ro M., Tarrasa, Hispanujo.
Spysz, s-ino Krystyna, Warszawa, Polujo.
Tuch, s-ino M. Rozalia, Toronto, Kanado.
Ward, s-ro R. E., Bexleyheath, Britujo.

## MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1967

11 Zielinski, s-ro Zb., Aŭstrujo. 12 Kennedy, s-ro D.; 13 Kennedy, s-ino M.; 14 Mee, s-ro L., Britujo. 15 Bjerg-Nielsen, s-ro J.; 16 Blume, s-ro Arne; 17 Frey, s-ro H. H.; 18 Hou, s-ro C. H.; 19 Jensen, s-ro J. P.; 20 Kehlet, s-ro Torben; 21 Lange, s-ro Otto C.; 22 Larsen, s-ro S.; 23 Riisbjerg, f-ino G.; 24 Schrøder, s-ro Ole; 25 Ziegler, s-ro Sven, Danujo. 26 Pyykönen, s-ro Juho, Finnlando. 27 Belhoste, s-ro L.; 28 Bernard, s-ro R.; 29 Cellier, s-ro P.; 30 Curnelle, s-ro René; 31 Larglantier, s-ro Georges; 32 Pera, s-ro Jean; 33 Ploussu, s-ro A., Francujo. 34 Jolliet, s-ro Leo; Germanujo. 35 Al-Amily, s-ro Hussain M., Irako. 36 Terrazzini, s-ino L. Spadaro, Italujo. 37 Cao, s-ro Victor Luis, Japanujo. 38 Henderson, s-ino Dorothy M.; 39 Maier-Bevel, s-ino A. L., Kanado. 40 Kat, s-ro F. H.; 41 Mast, s-ro J. L.; 42 Postma, f-ino Tj.; 43 Wensing, s-ro E. L. M., Nederlando. 44 Engen, s-ro Per, Norvegujo. 45 Ahlin, s-ro E. V.; 46 Andrén, s-ino Ester; 47 Bengtsson, s-ro Karl; 48 Björklund, s-ro F.; 49 Brandemar, s-ro Nils; 50 Dahl, s-ro Einar; 51 Fejde, f-ino Gunnel; 52 Fejde, s-ro M.; 53 Fingalsson, s-ro B.; 54 Forslund, s-ro Ingve; 55 Frode, s-ro O.; 56 Hedlund, s-ino I.; 57 Johansson, s-ro Erik; 58 Johnsson, s-ino Margareta; 59 Julin, s-ro Teodor; 60 Lagerkrantz, s-ro L.; 61 Moberg, s-ro Karl J.; 62 Nordström, s-ino G.; 63 Olsson, s-ro Hj.; 64 Olsson, s-ro Olle; 65 Pettersson, s-ro Folke; 66 Sandelin, s-ro Bo; 67 Wedholm, s-ino Anna, Svedujo. 68 Beard, s-ro Ralph H.; 69 Knox, s-ro Wm. A.; 70 Nace, s-ro Paul E.; 71 Palermo, s-ro V.; 72 Vallon, s-ino D., Usono.

## DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Germanujo: Grundhoff, s-ro J., 9,—; Jolliet, s-ro Leo, 9,—; Lowitzer, s-ro Fritz, 5,—. Hispanujo: Gonzalez Cantero, s-ro P., 4,20; Martin, s-ro V., 8,22; Vilagran Llorens, s-ro, 7,50. Japanujo: Sugawara, s-ro Keiiti, 1,—. Nederlando: Beekhuysen, s-ro B. R., 3,—; Kat, s-ro F. H., 22,50. Nov-Zelando: McNamara, s-ro M. C., 100,—. Svisujo: Bouvier, s-ro P., 30,—; Mischler, s-ro K. H., 20,86.

## POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Aŭstralio: Hobart Esperanto Group, 159,08. Germanujo: Lowitzer, s-ro Fritz, 5,—. Hispanujo: Criach, s-ro Ant., 22,50. Svedujo: Andersson, s-ro Gust., 13,89.

| | |
|---|---|
| Sumo entute ricevita: | 25.262,12 gld. |
| Sumo elspezita: | 25 851,54 gld. |
| Saldo negativa: | 589,42 gld. |

## FONDAJO CANUTO

Kanado: Salonen, s-ro Vilho, 1 MA.

## FONDAJO AZIO-AFRIKO

Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 70,— gld. (Por Konga Esperanto-Instituto).

## DONACO POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Nederlando: Bakker, s-ro H., 4,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

### DATREVENO DE ZAMENHOF

La Estraro de UEA atentigas la Landajn Asociojn kaj lokajn societojn pri la 50-a datreveno de la morto de Zamenhof, la 14-an de aprilo, kaj rekomendas celebri ĝin en konvena maniero, ekz. per artikoloj en la gazetaro. Abundaj materialoj troviĝas en la Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro.

### DANKO PRO BONDEZIROJ

Ankaŭ ĉi-jare la Centra Oficejo en Rotterdam kaj la oficejo de CED en Londono ricevis el ĉiuj mondopartoj amason da bondeziroj okaze de la jarfinaj festoj. Nepovante respondi individue, ni per tiuj ĉi linioj deziras al ĉiuj sendintoj kaj al la tuta membraro plej bonajn sukcesojn en 1967 !

## ANONCETOJ

*(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)*

**Ĝojigu** entuziasman korespondeman grupon da gejunuloj 12-20-jaraj ! Ili serĉas geamikojn en la tuta mondo. Kelkaj estas komencantoj. Ankaŭ pli aĝaj klubmembroj deziras korespondi. Stanislav Kares, Polst 47, p. Miletin, okres Jicin, Ĉeĥoslovakujo.

**Filatelistoj** kaj Glumark-kolektantoj. Mendu koverton kun speciala poŝtstampo (esperanta) pri la jarkongreso de Sveda Esperanto-Federacio en Norrköping 13-15 majo 1967. Koverto kun dek glumarkoj = 3 intern. respondkuponoj. Esperanto-Klubo de Norrköping, poŝtfako 49, Norrköping, Svedujo.

**S-ro Dmytro Sawkewycz,** P.O. Box 128, Grimsby, Ontario, Kanado, deziras interŝanĝi poŝtkartojn koloritajn kun landvidaĵoj.

**La Montreala Esperanto-Klubo** urĝas ĉiujn skribi esperantlingve al "EXPO - 67", Montrealo, Kanado, petante informojn pri la Monda Ekspozicio. Tio subtenos niajn fortostreĉojn interesi aŭtoritatojn en la Esperanta lingvo.

**Se vi ankoraŭ ne konatiĝis** kun la KOKO-libroj, luksaspektaj, daŭre valoraj literaturaĵoj, kial ne peti senpagan prospekton ĉe Eldonejo KOKO, Jyllinge, Roskilde, Danlando ?

**Ĉu troviĝas faktoj** en la aserto, ke simpatio kreas simpation ? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F, Danlando.

**Letervesperon** fine de marto 1967 aranĝos nia klubo, kies multaj membroj 12-50-jaraj deziras korespondi. Bonvolu skribi al la adreso: Esperanto-Klubo, Hudební škola, Žďár nad Sáz., Ĉeĥoslovakio.

**Por estontaj ekspozicioj,** la "Société espérantiste de Lyon" 7 rue Major Martin, Lyon, I-er, Francujo, bezonas poŝtmarkojn, reklamflugfoliojn, afiŝojn en Esperanto pri turismo, transportoj, komerco, industrio, ktp. ktp. Ĝi antaŭdankas vin. Certa respondo.

**Bulteno Gepatra** 1948-57, Praktiko 1950-56, 64-66 vendas (plejpropono !) Gieseler, 1) Berlin 281, Forstweg 79, Germanujo.

**Rotario** - La Internacia Kongreso de Rotary International, kiu okazos en Nice dum Majo 1967 enhavos Esperanto-Standon. Amase sendu salutojn, gratulojn kaj bondezirojn. Adreso: Rotary, Hôtel Negresco, 06-Nice, Francujo.

**Universala Skribo** - Manuel Halvelik. Bazita sur latina alfabeto kaj fonetiko por unuece reformi la ortografion de ajna lingvo. 128 paĝojn, 30 stelojn. Vendata de UEA.

**Letervespero.** Pro la fino de nia daŭriga kurso ni petas el ĉiuj landoj leterojn kaj salutkartojn. Skribu al: Esperantoklubo, Eindhoven, Nederlando, Floraplein 23. Respondo garantiita.

**Bonvolu atenti !** Montriĝis, ke pluraj ekzempleroj el la plej unua kvanto de la nova libro de prof. Lapenna: Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj estis malbone binditaj. Tiuj, kiujn trafis tia ekzemplero, bonvolu resendi ĝin, kaj ili tuj ricevos anstataŭe solide binditan ekzempleron. — La eldoninto.

**Anoj de Lions International,** kiuj estas esperantistoj aŭ interesiĝas pri la Esperanto-movado, priskribu vian vidpunkton pri fondo de "Esperanto-Grupo de Leonoj" por interŝanĝi ideojn per leteroj aŭ seeble renkontiĝi en Universala Kongreso aŭ Internacia Kunveno de Leonoj. Ni deziras kontakti amikojn-"Leonojn". Skribu al s-ro Nils Gösta Narvala, Majavatie 14 A 7, Helsinki 80, aŭ John Kailenta, 83 Kemball Ave., Staten Island, N.Y. 10314, Usono. Esperantistoj, kiuj ankaŭ interesiĝas pri la Internacio de Leonoj bv. skribi por informoj.

**LAVESPA,** kiu estas mondmovado al invalidoj kaj handikapuloj, deziras kontakti geamikojn de tuta mondo. Skribu al s-ro Manuel M. Heidun, Vestergade 53, Strib. Danlando.

**Por sukcesi** kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10%.

**Lernejoj!** Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

**Se vi serĉas seriozajn** gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

**Urba muzeo en Vsetín** proponis al nia rondeto instali Esperanto-ekspozicion en grandaj ejoj de loka kastelo. Bonvolu al ni sendi E-aĵojn, librojn, gazetojn, afiŝojn. Ĉiun sendaĵon ni klopodos rekompenci per alsendo de diversaj E-aĵoj de nia lando. Kolektas estro de la Esperanto-rondeto ĉe Klubo Sklář Vsetín: Aleš Berka, Vsetín 1423, ČSSR.

**La Grupo Esperantista** Ateneo Jovellanos, Gijón, Hispanujo, okazigos dum marto 1967 muran kalendaran ekspozicion. Ni deziras, ke la tuta mondo estu reprezentata. Sendu ilin amase ! (Uzitaj ankaŭ validas.) Rekompence Gijonan donacon.

**La Poŝtmark-kolektado** daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, ol tio, kion vi mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Zacho (por UEA), Åmosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

**Ĉiu gazeto dependas de iu:** organizaĵo, partio, financa grupo aŭ unuopulo

# esperanto

## revuo internacia

*estas la ĉefa oficiala organo de UEA kaj dependas de la tuta membraro kaj de la instancoj, kiujn la membraro libere elektas laŭ la Statuto ĉiun trian jaron.*

**TIAL, „ESPERANTO"**

la plej internacia Esperanto-revuo en la mondo kun legantoj en pli ol 80 landoj,

**SERVAS**

la celojn de Universala Esperanto-Asocio kaj helpas al la plenumo de realecaj laborprogramoj, akceptitaj de la Komitato por plia progresigo de la Internacia Lingvo;

**ESTAS REDAKTATA**

internaciisme kaj respegulas la aspirojn de la multnacia membraro de UEA;

**OBJEKTIVE INFORMAS**

pri la malfacilaĵoj kaj pri la ĉefaj atingoj de la Internacia Lingvo en la mondo;

**PUBLIKIGAS**

altnivelajn artikolojn, analizajn studojn kaj recenzojn, verkitajn de internacia kunlaborantaro;

**ENHAVAS**

interesajn konstantajn rubrikojn: CED, Radio, Junularo, Mallongaj novaĵoj k.a.

## *La Revuo Esperanto*

**dependas de vi, esperantistoj ĉie en la mondo, ĝi estas via!**

**Tial, ĝis maksimumo varbu por ĝi abonantojn kaj membrojn-abonantojn tra la tuta movado. Donace abonigu tiujn, kiuj ne povas pagi mem. Donu tiun ĉi ekzempleron specimene al esperantisto, kiu ankoraŭ ne abonas ĝin, kaj petu de la Centra Oficejo alian ekzempleron, informante samtempe pri la nomo kaj adreso de la persono, al kiu vi donis ĝin. Se la koncernato poste abonos aŭ aliĝos, vi ricevos premion.**

*Abonprezo: 18,75 gld., 75 steloj jare. Ĉiu Membro-Abonanto de UEA (kotizo por 1967: 25 gld., 100 steloj) ricevas senpage la revuon Esperanto kaj la ampleksan jarlibron.*

**Kotizojn kaj abonojn akceptas la C.O. de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, aŭ la ĉefdelegitoj kaj perantoj de U.E.A.**

**KOLEKTU LA ELDONSERION**

# ORIENTO-OKCIDENTO

**eldonatan sub aŭspicio de UEA**

## LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA ŜTONO**, sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.; broŝ. 8,50 gld.

2. **RAKONTOJ DE OOGAI,** kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyô-dayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.

3. **LA NAŬZO,** eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.

4. **KALEVALA,** la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.

5. **MARTÍN FIERRO,** iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rim-versa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.

6. **REĜO LEAR,** unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio, K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.

7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO,** de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

**LA DIA KOMEDIO,** de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

**Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj**

**Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.**

**Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando**

**Ole Ramby:** **Novaĵo !**

## NATURA NUTRADO

Ĵus aperis tiu 14-paĝa broŝuro tradukita el la dana de **Betty Larsen.** Kun bele ilustrita kovrilo.

Natura nutrado estas rimedo por regenerado de la organismo. Ĝi helpas konservi vian sanon.

La broŝuro kostas $ 0.25 (Fr.Fr. 1.20) aŭ ekvivalento.

Ĉe SAT, 67 av. Gambetta, Paris-20 (poŝtkonto 1234.22 Paris) aŭ ĉe via Libroservo.

## Du Malsanoj en Esperanto

de H. A. de Hoog

Tiu libro estis eldonita en la jaro 1954, sed ankoraŭ ĝi estas aktuala, ĉar eĉ hodiaŭ oni kelkfoje rimarkas la "tiom-kiom"- kaj la "tia-kia"-malsanojn en nia literaturo.

La prezo de la libro estas nun sv. Kr 6:— inkl. sendkostojn. Havebla ĉe la eldoninto

Erik Carlén, Hällabrottet, Svedio

poŝtĉeka konto 34 34 81

## Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj okazos 23.-30. de julio en La internacia Altlernejo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
**Åbyhøj,** Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 15.-21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

Japana ĝenro

## UKIJOE

SIGELMARKOJ ! !



3,7 x 5,5 cm 10 bildoj

Belaj Multkoloraj Majstraĵoj Sur japana papero, de la famekonataj Majstroj: HOKUSAI HIROŜIGE UTAMARO k.t.p.

### Prezoj

(kun afranko)
1 folio: 4 irk aŭ $ 0,5
5 folioj kun 1 bildo 7,5 x 11 cm: 17 irk, $ 2
10 folioj k. japana esp. 35 p. libro: 30 irk, $ 3,75

### Mendu ! !

al ESPERO
P.O.Box 18, TURUMI, YOKOHAMA,
JAPANUJO

## IVO LAPENNA
## ELEKTITAJ PAROLADOJ
## KAJ PRELEGOJ

**La Unua Parto** konsistas el 16 paroladoj faritaj inter 1950 kaj 1966 dum la Universalaj Kongresoj aŭ en aliaj okazoj, inkluzive la pledojn por Esperanto en la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Parizo (1952) kaj Montevideo (1954).

**La Dua Parto** enhavas tri tekstojn pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, D-ro L. L. Zamenhof kaj U.E.A., kiuj povas esti taŭge utiligataj aŭ komplete aŭ parte ankaŭ por prelegoj, radioelsendoj, artikoloj aŭ informoj.

**ĈIU** leginto de RETORIKO, **ĈIU** persono, kiu iam aŭdis la aŭtoron paroli, certe havigos al si tiun ĉi libron, kies enhavo iusence signas la etapojn de evoluo de la Esperanto-Movado en la eventoplenaj 16 jaroj, al kiuj ili rilatas.

Eldono de la aŭtoro.

Proks. 150 pp., formato 20 x 15 cm (kiel Retoriko), plaste bindita.
Prezo: 11 gld. aŭ 44 steloj. Mendu ĉe UEA !




**JEN VERKO NECESA POR NIA KONFUZA MONDO**

DULINGVA LIBRO (HISPANE KAJ ESPERANTE) HONORE AL U. N. - ORGANIZO EN LA JARO DE INTERNACIA KUNLABORO

Enhavo universale valora: Interesega — Instrua — Eduka — Literatura — Agrabla — Poezia kaj tre ilustrita

Unuiĝintaj Nacioj — Homaj rajtoj — Zamenhof, Paca Apostolo — Esperanto kaj Unesko — Esperanto-kulturo — Esperanto-lernolibro (por Hispanlingvanoj) — Poezia antologio Hispana kaj Hispanamerika — kaj aliaj diversaj temoj tre interesaj

Bindita volumo (cm. 20 × 15) 376 paĝoj, presitaj sur bona papero, kaj ilustrita per 130 fotogravuroj

BONEGA LIBRO POR DONACO

Prezo: U$S 4.00 afrankite

Mendoj al UEA, al diversaj libroservoj aŭ rekte al "LA BONA SEMISTO"

Casilla de Correo 863

MONTEVIDEO (Urugvajo)

**85a**

**VIENA**

**INTERNACIA**

**FOIRO**

UNION DES FOIRES INTERNATIONALES

**12an – 19an de Marto 1967**

**modo kaj mastrumado**

**mebloj**

**tekniko, industrio, metio**

**kampokulturo**

WIENER MESSE-AKTIENGESELLSCHAFT, MESSEPLATZ 1, 93 15 24 A 1070 WIEN

15872